




2·90*137*

STARTO

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO · ASOCIO





KORESPOND DEZIROJ ANONCOJ

Vadim Ĉajkin, p.k. 24, Ĉjurupinsk-1, USSR-326520 dez. kor. tutmonde pri orientkulturo, batalartoj, atletismo kaj naturismo.

14-15-jaraj hungaraj gimnazianoj korespondus pri ĉiuj temoj kun esperantistoj tutmonde: Esperanta grupo "Amikeco", Kossuth gimnázium, 3525, Miskolc, Dayka G. út. 4s2, Hungario.

Kiu grandurba intelektulino deziras korespondi kun mi ĉeĥe, slovake, Esperante? Mi estas 42-jara poligloto. Intereso: lingvoj, literaturoj, vojaĝoj. Reciproka gastigado ebla, sed ne nepre. Robert PONTNAU, 6 rue du Canard, 31000 Toulouse, Francio.

27-jara ĉina akupunktura kaj moksa doktoro volas korespondi kun medicinisto, kiu ŝatas ĉinan tradicion medicinon. Krome li ŝatas ĉs. poŝtmarkojn kaj kolektaĵojn p.m. pri oleopentraĵoj. P.R.China, BEIJING, East City (100010), Gannian Hutong Dongluoquan 11 hao N- 1401, Ge Xiao-dong.

22-jara e-isto interesigas pri aktuala politiko, historio, lingvoj, religio, filozofio kaj literaturo. Aser Kraus, HADAR 47, HERZLIYA 46326, Israel.

29-jara oficistino interesigas pri turismo, sporto kaj literaturo, kolektaĵojn sondisko. Andrzej Orszulak, 56-500 Syców, Kościelna 19a, Pollando.

Grupo de komencantoj (10 - 15 j.) deziras korespondi pri ĉiuj temoj. La grupo volas intersangi salutkartojn, kalendarojn, E-revuojn, insignojn kaj E-aĵojn por ekspozicio. Hanna Kwasniewicz, Esperanto-grupo, Szkoła Podstawowa nr. 7, ul. Tokstojna 1, 43-100 TYCHY, Pollando.

17-jara lernanto interesigas pri turismo, kolektaĵojn globkrajonojn, bildkartojn kaj turismajn prospektojn. Jarosław Michał Gawron, ul. Gwiaździsta 8/9, PL-67-200 Głogów, Pollando.

29-jara bibliotekistino interesigas pri geografio, historio kaj nuntempa vivo de Hispanio kaj Sudameriko, fremdaj lingvoj, psikotroniko, kolektaĵojn orajn pensojn kaj bildkartojn, povas korespondi ankaŭ hispane. Maria Szmelter, 85-322 Bydgoszcz, str. Gałczyńskiego 19/43, Pollando.

20-jara gaja knabino interesigas pri turismo kaj plastiko. Bożena Kania, Chrzanów-Balin, ul. Ciężkowska 541, 52-500 CHRZANÓW, woj. Katowice, Pollando.

29-jara pola e-isto volas korespondi kun ĉeĥaj e-istinoj, interesigas pri muziko, filmo, legas fantastikan literaturon kaj iom fotos. Andrzej Mazur, str. Długa 33/12, 66-210 Zbąszynek, Poll.

31-jara knabino interesigas pri turismo, literaturo kaj modo, kolektaĵojn poŝtmarkojn kaj bildkartojn. Józefa Broda, 33-133 Wał-Ruda 67, Pollando.

28-jaraj geedzoj ŝatas veturi kaj skribi leterojn, deziras korespondi por profundigi la lingvokonon. Ili estas Eva kaj Ĉeslavo Pietraszewscy (instruistino kaj oficisto), Leszczany, 22-114 Żmudź, Poll.

15-jara e-istino interesigas pri turismo, muziko, kolektaĵojn poŝtmarkojn kaj bildkartojn, volas korespondi kun gee-istoj el Kanado, Germanio, Francio, Usono, Brazilo, Britio, Hispanio, Italio, Bulgario, Aŭstralio, Ĉinio, Ĉeĥoslovakio, Sovetunio, Japanio. Edyta Martyn, ul. XXX-lecia PRL Nr. 39, 63-900 Rawicz, Pollando.

La ŝaksekcio de ĈEA aranĝos la III-an VERDAN ŜAKOLIMPIKON en banurbo Poděbrady (ĈSSR) de la 5-a ĝis la 14-a de julio 1991. Laŭ provizora programo oni antaŭvidas ŝakolimpikon de 4-opaj viraĵnaciaj teamoj kaj 2-opaj virinaj teamoj, en grupo "C" ludos junular-teamoj. Informojn sendas Václav Štěpánek, Macurova 16, CS-143 00 Praha, Ĉeĥoslovakio.

1990-LA JARO DE ALFABETIZO



La analfabetismo estas tre grava problemo de la homa socio. Oni konstatas, ke en la nuna tempo 900 milionoj da plenkreskuloj en la tuta mondo ne scipovas legi kaj skribi. Dum en la evoluintaj landoj estas analfabetaj 2-4 % da plenkreskuloj, en la evolulandoj la procentoj de analfabetoj estas tre altaj, precipe ĉe virinoj.

La radikojn de la analfabetismo oni devas serĉi en la ekonomiaj, politikaj kaj kulturaj kondiĉoj de la socio. La alto de ekonomia nivelo de la socio kondiĉas ties edukan nivelon kaj kreskon de legokapablo. La klereco estas ne nur rezulto, sed ankaŭ kondiĉo de la ekonomia disvolvigo. La malkresko de la analfabetismo kaj kun tio la kresko de la klereco estas neevitebla kondiĉo de la sukcesa ekonomia kaj scienteĥnika disvolvigo. Pro tio precipe por evolulandoj la lukto kontraŭ la analfabetismon estas la unuaranga tasko.

La politikaj kondiĉoj de la socio respeguligas en diferencoj de klereco de unuopaj klasoj kaj la lukto kontraŭ la analfabetismon egalrajtigas ĉiujn homojn rilate al la klereco. La samon oni povas diri ankaŭ pri la kulturaj kondiĉoj de la socio. Sed estas fakto, ke la legokapablo ne estas fundamento de ĉiuj kulturoj; ekzistis kulturoj tre disvolvitaĵ kaj altnivelaj, sed tute sen ia ajn bezono de skribado kaj legado. Ankaŭ en la nuna tempo kun la kresko de graveco de la radio kaj televido kreskas la graveco de parola esprimado, kaj la skribokapablo ne plu estas la sola pruvo de klereco.

Por emfazi la strebojn disvastigi la fundamentojn de la homa kulturo UNO - instigite de UNESKO - proklamis la jaron 1990 la Jaro de lukto kontraŭ la analfabetismon, la Jaro de alfabetizo. Oni organizos helpon al evolulandoj per disponigo de fakaj instruistoj, metodikistoj, sciencaj pedagogiaj laborantoj kaj ankaŭ per materia helpo, kiel instruhelpiloj, kajeroj, paperoj, presarangoj per presi lernolibrojn en etnaj lingvoj ktp. Tiu ĉi aktiveco kulminos la 8-an de septembro, kiu estos la Tago de la Alfabetizo.

Sed la analfabetismo ne estas plago nur en evolulandoj. Ankaŭ en la evoluintaj landoj ĝi ekzistas, kvankam ofte en formo de la sekundara analfabetismo, kio estas iaspeca perdo de kapablo legi pro nura spektado de la televido aŭ de bildstriaĵoj gazetaj.

Dum la analfabetismo troviĝas ĉe etnaj lingvoj, ĉe Esperanto tiu fenomeno ne estas konata. Inter esperantistoj ne troviĝas analfabetoj, ĉar la lernado de Esperanto premias la lego- kaj skribo-kapablon. Sekve ni povas konkludi, ke la lukto kontraŭ la analfabetismon preparas vojon por la disvastigo de Esperanto. Tial en la laboroj de la Jaro de Alfabetizo la Esperantaĵaj organizaĵoj kaj institucioj ne staros flanke. red-

Esperanto kaj protektado de vivmedio

Se la homo volas, ke lin ne trafu la sorto de tiuj malfeliĉaj vivaj organismoj, kiuj pereis konsekyence de ŝanĝo de vivmedio, necesas, ke li komencu batali kontraŭ ĉio, kio senvalorigas la vivkondiĉojn, sen kiuj ne povas daŭri vivo de homa gento sur nia tero, kaj ke li eluzu ĉiujn eblecojn por plibonigo de ĉi tiuj kondiĉoj.

Oni povas diri, ke ekzistas tri plej gravaj faktoroj, al kiuj ni devas turni nian atenton. Ili estas: aero, akvo kaj plugebla tero.

Situacio de la atmosfero daŭre malpliboniĝas. Negativan influon ĉi tie plenumas antaŭ ĉio spontana evoluo de tekniko kaj industrio. Ni konsciigu, kiom da malpuraĵoj sputas ĉiutage en la atmosferon gigantaj kamionoj de industriaj entreprenoj kaj kiom da altvalora oksigeno konsumas aŭtoj kaj aviadiloj /speciale jet-aviadiloj/ tutmonde. Temas pri preskaŭ neimageblaj kvantoj. Kaj dume multaj homoj hodiaŭ konsciigas, kiel gravaj estas por ilia vivo la arboj, arbaroj, tiuj produktantoj de oksigeno. Grandmezure oni faliĝas arbarojn en teritorioj ĉe Amazono, en sudorienta Azio ktp. Ne malutilos prezenti la realojn, ke nur en la unua duono de nia jarcento duobliĝis la kvanto de karbondioksido en atmosfero; dum en epokoj de milionoj da jaroj antaŭ nia jarcento la strukturo de la atmosfero preskaŭ ne ŝanĝiĝis. Ni povas ĉi tie ankaŭ substreki, ke ekzistas "altevoluintaj industriaj landoj", kiuj vivas el oksigeno, produktita en aliaj teritorioj de nia planedo. Interŝanĝe por ĝi ili liveras siajn malpuraĵojn. - En tiu ĉi konteksto mi volas ankaŭ mencii pri tiel nomata "flordoma efeto". Ĝi plifortiĝas sekve de pligrandigo de karbondioksidkvanto en la atmosfero. Rezulto de tiu plifortiĝo estas pli alta temperaturo de aero, kiu povus havi neantaŭvideblajn sekvojn.

Rilate al la akvo, ni scias, ke ĝi estas senvalorigata per diversaj artefaritaj sterkajoj, kiuj penetras en ĝin, sed ankaŭ per aliaj produktoj, kiujn senrespondecaj homoj ellasas en ĝin. Fatalan rolon havas industriaj entreprenoj. Malgrau tio, ke en kelkaj landoj ekzistas leĝoj, protektantaj purecon de la akvo, oni ĝin tie tamen malpurigas, ĉar en tiuj leĝoj estas ankaŭ sufiĉe da spaco per ties ĉirkaŭirado. Okazas eĉ tiaj kazoj, ke certa fabriko preferas punpagon, ol konstrui ordonitan akvopurigejon. Onidire tio estas pli ekonomia! - Katastrofajn malpurigadojn de maroj kaŭzas penetrado de kruda nafto el averitrafitaj ŝipoj. Ĉi tien apartenas ankaŭ mencio pri acidaj pluvoj, enhavantaj oksidon de nitrogeno /rezulto de autotrafiko/. Ili efikas je pezaj metaloj kaj tiel estiĝantaj kemiaj kombinaĵoj troviĝas poste en akvoj. Ĉu oni povas primiri amasajn pereojn de tuta vico de animalspecioj, vivantaj en akvoj?

Kaj nun ni turnos nian atenton al tria faktoro, necesas por nia vivo. Ĝi estas fekunda tero. Substrekinda estas la realeco, ke daŭras kelkajn centjarojn antaŭ ol estiĝas unu centimetron alta tavolo de plugebla tero. Kaj kiamaniere oni manipulas tiun altvaloran materialon? Oni konstruas grandegajn konstruaĵojn, por kiuj necesas kavigi fundamentojn. La plugeblan teron oni forveturigas ien, kie ĝi restos neeluzita. Egaj valbarajoj englutas egale egajn areojn de fruktoporta tero. Tio ĉi estas nepardonebla malsparado de valorajoj, apartenantaj al tuta homaro. Ankaŭ la feligado de tropikaj praarbaroj sekvas forportado de bona tero per akvo, poste pereado de la vivo.

Tiel estiĝas kaj plilargiĝas dezertoj.

Kia estas solvo de tiu ĉi fatala situacio, por ke ne okazu fina katastrofo. Antaŭ ĉio forigi ĉiujn negativajn influojn je la vivmedio kaj male, subteni ĉiujn pozitivajn. - Nian atenton ni multe turnadis al la grandaj industriaj objektoj. Necesus rekonstrui ilin ĉiujn je tiel nomataj fermitaj cirkuladoj de akvo kaj gasoj, por ke ili eksigu neniam malpuraĵojn en la akvon kaj atmosferon. Necesus renovigi rompitan ekologian ekvilibron. Purigi riverojn, lagojn, rekultivadi senvalorigitan teron. Tio ĉi estas kompreneble tre multekosta. Tial estas necesas batalo por konstruo de homa konscienco, por forigo de egoismo, kiu devus esti tute anstataŭita per senco por tio, kio estas nia devo rilate al estontaj generacioj. Ĝi estas tutmonda problemo. Senvalorigado de vivmedio ne estas limigita nur al kelkaj teritorioj de nia tero.

Ĉar Esperanto fariĝis interpretanto de bonaj pensoj en internacia mezuro, mi opinias, ke en demando pri la protektado de vivmedio ĝi povas ludi tre gravan rolon. Tion ĉi certe konsciigis membroj de Esperanto-Klubo en Samarkando /Uzbekio/, kiuj kolektas ĉiujn propagandilojn, koncernantaj tiun problemaron, kun intenco ekspozicii ilin. Se esperantistoj envicigas en unuecan fronton por konservo de tutmonda paco, ili havas ĉiujn supozojn enviciĝi en unuecan fronton por ekologia ekvilibro sur nia tero. Parenteze dirite, se nur certa parto de tiuj kostajoj, kiujn oni uzas por celoj de armado, transkondukigis en sferon de vivmedia rebonigo, la tuta problemaro povus esti solvita!

L. Huf

VERDA HELPO en Jeseníky

Okaze de internacia jaro de protektado de vivmedio, kunlabore kun Sekcio de naturprotektantoj ĉe ĈEA kaj E-klubo Šumperk, okazis en Jeseníky en tagoj de la 7-a ĝis la 20-a de aŭgusto 1989 la unua Esperanta arbora labortendaro VERDA HELPO.

Ĝia celo estis ne nur la konkreta helpo al arbaroj, sed ankaŭ la propagando de Esperanto en Ĉeĥoslovakio kaj ankaŭ akiro de libervola financa kontribuo por evoluo de Sekcio de esperantistoj-handikapuloj.

Dek ĝeopartoprenantoj el Bohemio kaj Moravio dum sia restado laboris ĉe arbar-entrepreno Loučná nad Desnou, kie sur 17 hektaroj de novaj junarbaroj ili efektivigis la ĉirkaŭfalcadon de junaj piceetoj.

Ankaŭ okazis vizitoj de vitro-fabriko en Rapotín, same de kastelo, paper-fabriko kaj banejo en Velké Losiny ĉe urbo Šumperk. La ĝeopartoprenantoj ankaŭ konatigis kun la ekologia situacio kaj naturbelecoj de Jeseníky. Liberaj tempoj servis al promenado en ĉirkaŭajo, aŭ ankaŭ al bano en termal-baseno en Velké Losiny. Neforgeseblaj estis ankaŭ kunaj vesperaj sidigoj ĉe tendarŝajro aŭ paroladoj de samideano Miroslav Volný el Frýdek-Místek, kompletigitaj per projekciado de koloraj diapozitivoj.

Por grupo de neesperantistoj, kiuj ankaŭ partoprenis la tendaron, okazis vesperaj stud-duonhoroj, kie ĉiuj geinteresuloj havis eblon konatiĝi ne nur kun historio kaj estigo de Esperanto, kun ĝia tutmonda misio kaj organiza strukturo en nia lando kaj en la mondo, sed ili eklernis ankaŭ fundamentojn de E-konversacio kaj gramatiko.

La laboro en montoj kaj sur arbar-senarbejoj estis ofte pretendema kaj penega, sed ĝi helpis krei atmosferon de vera amikeco en la tendaro. La lasta agado de la gepartoprenantoj de ĉi tiu ĝis nun unusola E-arbara tendaro VERDA HELPO en Ĉeĥoslovakio kaj Eŭropo estis la plantado de Esperanto-arbo en montoj: kiel la esprimo de reciproka amikeco, esprimo de efika renovigo de ĉitiesaj arbaroj - kaj ankaŭ kiel la simbolo por meti fundamentojn de E-arbara movado en montaro Jeseníky. Por E-sekcio de handikapuloj oni kolektis la sumon de 450,- kronoj.

La tuta sukcesa pago de la tendaro montris, ke la ideo efektiviĝi ĉi tiun agadon - malgraŭ ĉiuj malhelpoj kaj komencaj malfacilaĵoj - estis gusta kaj utila. Tial en la venanta jaro 1990 estas en Jeseníky preparota plua E-arbartendaro VERDA HELPO. Ĉiuj geinteresuloj povas ricevi pli detalajn informojn (bonvolu almeti postmarkon por respondo) je la adreso: VERDA HELPO, Stanislav Droppa, 546, 788 14 Šumperk 6.

St. Droppa

Informojn pri la laboro de la sekcio de naturprotektantoj de ĈEA ni sendos al nur veraj geinteresatoj pri nia agado. Ni ĉefe organizas arb-brigadojn en montoj kaj labor-renkontigojn. Se vi volas plibonigi nian vivmedion, skribu al Ĉeĥa Esperanto-Asocio, sekcio de naturprotektantoj, Jilská 10, 110 01 Praha 1.

Lidmila Potměšilová



Fotoj pri la VERDA HELPO Jeseníky 1989

Ĉevalrajdado - Jiří Kašpar el Pardubice sur ĉevalo Parit
Iom da ripozo en la laboro

Partoprenantoj de la unua Esperanta Arbara Labortendaro VERDA HELPO

Sur la apuda paĝo: Prifalĉado de picetoj.

De maldekstre: Sona Bendová el Jeseník,
Petr Čábelka kaj Luděk Šplíchal el Praha

Ĉiuj fotoj de Stanislav Droppa



Foto-kroniko pri la estrar-kunveno de ĈEA
okazinta la 9-an de septembro 1989 en Třebíč

1. La prezidanto de ĈEA Petr Chrdle enmanigas la diplomon "Honora membro de ĈEA" al s-ano František Sedláček
2. Du honoraj membroj de ĈEA antaŭ la domo de esperantistoj en Třebíč: la asocia sekretario Karel Franc kaj la "motoro" de la klubo en Třebíč kaj de la tendaro en Lančov Pavel Sittauer. Bedaŭrinde sur la foto ne estas videbla strattabulo kun la nomo "Esperantistů" - "La strato de esperantistoj"
3. La prezidanto de sekcio de mineralogoj s-ano Pešál (dekstre) meze de sia loĝejo, plena de mineraloj
4. La ordigo de tombo de prof. Kilian
5. La ĈEA-estraranoj kaj esperantistoj el Třebíč malantaŭ la tombo de prof. Theodor Kilian. Ni honorigis lian 95-an naskiĝtagon - li naskiĝis la 26-an de septembro 1894 en Ivančice.

Ĉiuj fotoj de Petr Chrdle

EL LA VIVO DE FERVOJISTOJ

Gaste ĉe aŭstria kolegoj en Arnoldstein

Sub protekto de s-ro Steinlechner Gerwald, urbestro de Arnoldstein, okazis de la 8a ĝis 10a de septembro 1989 en Arnoldstein /Aŭstrio/ jubilea 20a Trilanda Esperanto-Konferenco. Laŭ invito de la organizantoj enkaŭ kun nemaljuniganta Martin Stuppnig alveturis partoprenantoj el nau landoj, unu eĉ el fora Aŭstralio.

Post alveno kaj enlaĝigo de la partoprenantoj okazis vendrede la 8an de septembro 1989 je 19a horo distra interkona vespero kun publika programo. Urbestro de Arnoldstein, s-ro Steinlechner Gerwald salutis la partoprenantojn ankaŭ en la nomo de siaj kolegoj, urbestroj de Tarvisio /Italio/ kaj Krajnska Gora /Jugoslavio/ kaj akcentis, ke por Arnoldstein tiu ĉi renkonto okazis de la 3-landa marŝo /Tour 3/ estas grava evento, kiu donas gravajn signalojn por la paca kunlaboro inter 3 regionoj, inter 3 ŝtatoj, inter 3 kulturformoj. Li kore akceptis la intencon plivastigi la ideon de trilanda kunlaboro al pluraj regionoj, t.e. tiuj de la laborgrupo Alp-Adrio. Same prezidanto de la deputitoj de la liglando Karintio, s-ro Adam Unterrieder substrekis en siaj salutvortoj la gravajn klopodojn de la liglando Karintio por plibonigo de la kvalito de la homa ĉiutaga vivo, la klopodojn por savi la naturon antaŭ la malpurigo de aero kaj akvo por krei novajn lokojn por la ripozo por la en- kaj eksterlandaj gastoj kaj salutis intencojn de la esperantistoj pere de kunlaboro inter la laborkomunumo Alp-Adrio firmigi la kontaktojn trans la limojn kaj menciis la meritojn de la esperantistoj en tiu ĉi rilato. La oficialan ceremonion kaj aliloke poste okazintan gazetaran konferencon partoprenis kelkaj ĵurnalistoj kaj reprezentantoj de la aŭstria televido. La muzika kaj kanzona programo de la distra vespero daŭris preskaŭ tri horojn kaj partoprenis ĝin ankaŭ komunumanoj de Arnoldstein.

Sabate matene okazis en la centra preĝejo de Arnoldstein katalika diservo tute en Esperanto, sekvis en kulturdomo festkunveno de la 20a Trilanda Esperanto-Konferenco. Dum ĝeneralkunveno posttagmeze oni pritraktis bazon realigeblan por la estonta agado, inter alie oni plimultigis la organizan komitaton je reprezentantoj de FRG kaj Hungario kaj invitis por partopreni reprezentantojn de Francio, Svislando kaj Liĥtenŝtejno.

Dum la poste okazinta Fervojista fakkunveno de Aŭstria Federacio Esperantista Fervojista /AFEF/ sub prezido de ĝia prezidanto, ing. Walter Huber oni aŭskultis raporton pri la agado, salutvortojn de la delegitoj el 8 landoj kaj partoprenis fakprelegon de ing. Hubert Walter pri projekto de la nova fervojo en Aŭstrio.

Dum kultura vespero ni ĝuis interesan prezentadon de Esperanto-Cirko, pupteatro de ges-roj Banky el Budapeŝto.

Dimanĉe la 10an de septembro okazis ekskurso al la trilanda pinto Dreiländereck /1509 m/, kie kuntuŝas landlimoj de la tri diversaj landoj, tri diversaj naciecoj kaj kulturoj Austrio, Jugoslavio kaj Italio. Krom esperantistoj partoprenis tiun piediradon ĉirkaŭ dekkvin mil partoprenantoj el la menciitaj tri landoj. Supre okazadis publikaj popolfestoj, ne mankis ĉiuspecaj konsumaĵoj. Praktike tio signifis, ke partoprenantoj el ĉiuj menciitaj landoj povis supre sur la monto tra malfermitaj limoj libere transiri el aŭstria al itala kaj jugoslava partoj de la monto kaj inverse kaj por sialanda mono aĉetadi kaj gustumadi specialajn konsumaĵojn, ekzemple gulaŝon kun biero sur aŭstria parto, "pasta asciuta" kaj vinon sur itala kaj "čevapčići" kaj slivovicon sur jugoslava partoj de la monto. Parto de la programo estis ankaŭ konkurso tra ĉiuj tri landpartoj al la supro de la monto, kiun ankaŭ mi partoprenis kiel reprezentanto de la esperantistoj. Inter kelkaj dekoj de la kurantoj precipe el Austrio, Jugoslavio kaj Italio mi sukcesis en kategorio de la veteranoj okupi la 4an lokon.

Nevolonte ni adiaŭis niajn aŭstriaajn kaj alilandajn kolegojn, dankante al aŭstriaaj organizantoj pro la bone organizita, bela kaj interesa renkonto.

Jindřich Tomášek



Kelkaj partoprenantoj de la paŝekurso al la montopinto Dreiländereck dum mallonga ripozo sur itala parto de la monto

Kion ni faris vespere?

Ni babilis, ni kantis, ni ŝercis, ni aŭskultis kaj rigardis folkloran ensemblon el Karlovy Vary DYLEN, kiu prezentis al ni popolajn kantojn kaj ankaŭ dancojn el la okcidenta parto de Bohemio, post oficiala programo povis la partoprenantoj ankaŭ danci, ĉar la muzikantoj ludis ankaŭ por dancado. "Kamera ĥoro de renesancaj kantoj" prezentis dum alia vespero kelkajn kantojn el la 15-a kaj 16-a jarcento. Inauguran vesperon ni dediĉis al neceso de paca kunvivado - per kelkaj poemoj kaj citaĵoj parolis al la partoprenantoj poetoj kaj elstaraj tutmonde konataj personoj. Per vortoj de Viktor Hugo "La estonteco apartenas ne al la bombo, sed al la libro, ne al la milito, sed al la paco" ni esprimis, ke ni esperantistoj scias, ke la unua devo por ĉiuj estas fari ĉion por la paco.

Ni subskribis ankaŭ "DEKLARON", kiu aperis en Starto 1/90.

En la nomo de organizantoj mi volus aldoni:

- 1/ Estas necese, ke al ĉiu renkontiĝo de esperantistoj venu nur tiuj, kiuj serioze interesigas pri la interkompreniĝo de diverslingve parolantaj homoj per Esperanto, ĉar unu el niaj punktoj estas "praktika eluzo de la lingvo Esperanto".
- 2/ Estas necese, ke venu nur tiuj, kiuj volas la lingvon kompreni kaj paroli kaj se venos ankaŭ tiuj, kiuj komprenas kaj parolas ankoraŭ ne ĉion, prenu kune la vortaron.
- 3/ Estas necese, ke la partoprenantoj ne nur komprenu informojn, rimarkojn kaj atentigojn de la organizantoj, sed ankaŭ ligu amikajn rilatojn.
- 4/ Estas necese, ke ĉiu lasu hejme zorgojn pri tio, kion ili intencis aĉeti. Niaj renkontiĝoj ne servas por aĉetado, sed por amikaj rilatoj. Al niaj gastoj ni volas rakonti ion interesan pri nia regiono, ne sciigi al ili, kio estas aŭ ne estas ĉe ni aĉetebla.

Alena Klementová

ESPERANTISTA PROTESTO

BRNO. Esperantista Klubo en Brno proteste kontraŭ la brutala interveno de polica regimento kontraŭ la trankvila studenta manifestacio la 17-an de novembro 1989 en Prago revokis la solenan koncerton omaĝe al la 130-a datreveno de naskiĝo de L. L. Zamenhof.

J.Vondroušek



BRNO La 3-an kaj 5-an de oktobro estis inaŭguritaj du kursoj de Esperanto por komencantoj kun 38 lernantoj. Instruas J. Vondroušek kaj Z. Hršel. J.V.

KRNOV Danke al persista laboro de membrino de ER Ostroj en Opava, s-ino Polová, komenciĝis en la urbo Krnov la unua postmilita Esperanto-kurso. La kurson organizas Kleriga kunularo (Osvětová beseda), instruas ing. Vlastimil Kočvara. Al la kurso aliĝis trideko da interesantoj, kiuj diligente eklernis nian lingvon. Post la nova jaro oni antaŭvidas eĉ fondigon de la nova Esp. rondeto en tiu ĉi urbo, kie jam estas kelkaj esperantistoj, ĝis nun membrigantaj en Opava rondeto. kov.

LIBEREC Oni elektis novan komitaton, en kiu estas prezidanto s-ano Luděk Holeček, vicprezidanto s-ano Jiří Hanousek, sekretario s-ano Jiří Kocanda, matrumanto s-ano Ing. Pavel Vladyka, kasisto s-ano Bohuslav Háva, kulturreferento s-ano Ladislav Špina, junular-referento s-ano František Wallach kaj komitat-membroj s-anoj Božena Gráperová kaj Dagmar Jurásková. En la revizia komisiono estas s-ano Ing. František Holeček kaj s-anoj Helena Němečková kaj Jiřina Brabcová. La klubo eldonis jubileajn insignojn al la 70-a datreveno de la fonda de la ĉeĥa E-klubo en Liberec. La klubo planas priesperantan informpanelon en la Nordboĥemia muzeo en Liberec.

NÁCHOD Sabate la 16-an de septembro 1989 ekskursis membroj de la E-rondeto "Amikeco" el Česká Třebová al gesamideanoj-geamikoj en Náchod. Oni kunvenis en restoracio proksime de urbo Náchod, kie post tagmanĝo estis por ĉiuj preparita konkursa: la rondetanoj el Česká Třebová havis taskon paroli pri memoraĵoj el ĉirkaŭaĵo de urbo Náchod, la naĥodanoj pri memoraĵoj el ĉirkaŭaĵo de Česká Třebová. Gajnis la naĥodanoj. Infanoj el Česká Třebová prezentis sin per kantoj, poemoj, fabeloj kaj sceneto pri Esperanto. Iu el la partoprenantoj diris: Fine mi audis Esperanton sen krokodilado! Du knabinoj el urbo Náchod ĉeestis infanan kongreson en Anglujo. En kantado, babilado, lotumado (ne mankis "mangota tombolo") tre rapide kuris tempo. La viziton partoprenis ankaŭ tri hungaraj samideanoj el Nyíregyháza, la ĝemela urbo de Česká Třebová.

Laŭ Z. Novotná

PARDUBICE En malgranda salono de ZK ROH Tesla Pardubice okazis la 11-an de novembro 1989 jam la kvara Esperanta tago. Partoprenis ĝin 87 ĉeestantoj el 22 lokoj de Bohemio. Dum la programo de la renkontigo oni informis pri la agado de la asocio, pri festotagoj de la 20-a datreveno de ĝia fondigo. La partoprenantoj rakontis pri siaj renkontigoj en eksterlando kaj pri siaj travivaĵoj. En kultura programo prezentis sin knabinoj el E-rondeto de ZK Tesla, Orientboĥemia trupo de kantoj kaj dancoj "Lipka", eĉ magiisto. De la renkontigo la ĉeestantoj forportis eĉ etajn memoraĵojn gajnatajn en riĉa tombolo. La gastigantoj esperas, ke la ĉeestantoj estis kontentaj, la programo placis al ili kaj ke ili vizitos nin denove ĉi-jare. P.Nechvíle

Lastatempe, la ĉeĥaj esperantistoj havis plurfojan okazon esti detale instruataj, kiel diverĝas la stiloj beletra, faka, konversacia k.t.p. Ĉi-konekse venis en mian kapon intenco emfazi ankaŭ la malon: Kio al ĉiuj stiloj devas resti komuna?

1. Sendube, ĉiuspeca stilo fariĝas grave mankhava, se en ĝi svarmas lingvaj eraroj. /Inter ni konfidence dirite, kelko de STARTO-kontribuantoj iom ŝuldas al kontentiga lingvonivelo./ Mi ne pensas nur pri misoj el la sfero gramatika, sed ĉefe pri fuŝoj semantikaj. Estas evitende citi ekzemplojn, por ke ne ofendiĝu la koncernatoj, kiuj mem klopodu memorteni, ke Esperanto estas same malfacila kiel etnolingvo, se konsideriĝas vortsignifoj.
2. Alia punkto ĝenerale valida por ĉiu stilo estas bona komprenebleco. Jes ja, tiu montriĝas rekte korelacia al inteligenteco kaj klereco de leganto. Tamen, ĉar finfine la stiloj siamaniere celas ion komuniki, ili nepre enhavu minimumon da malklaraĵoj, enigmoj, ciferoj. Talenta esploristo aŭ poeto kutime scias prezenti plej subtilan ideon helpe de esprimiloj kristalece klaraj.
3. La tria postulo direktiĝas al beleco. Unuavide povus ŝajni, ke ĝi koncernas sole beletron. Ja el la du vortoj mem /bela, beleto/ oni perceptas la parencecon etimologian. Aliflanke, el mia tre longa praktikado profesie sciencista, mi povas konfirmi, ke fakulo aplikanta stilon malbelan, pezmovan, monotonan neniam sukcesas diskonigi siajn esplorrezultojn tiom efike, kiom lia fak kolego pli elegantlingva.

Kaj, se mi revenu al la vigle diskutata stilo beletra, tuj mi konfesas mian nekredemon, ke beleco estas atingebla precipe per abundo aŭ eĉ troabundo da novaj vortoj. Male, estas al mi konate, ke lingvaĵo antikviĝas /aŭ pli precize dirite eksmodiĝas/ des pli rapide, ju pli ekstravaganca ĝi aspektas. Pri tiu ĉi fakto disponas ekzemplojn, ĉu el poezio, ĉu el prozo, probable ĉiu literaturo etnolingva.

Sed ankaŭ la stiloj komuniza, konversacia kaj simila liveras evidentan ateston pri estetika sento de sia parolanto. Ĝue oni aŭskultas rakontadon de familiano aŭ amiko, lekcion de instruisto, predikon de pastro, raporton de statisto - kondiĉe, ke iliaj stiloj impresas elegante. Kontraŭe, estante senkulturaĵoj, primitivaj eĉ vulgaraj, ili kapablas en plej bona okazo tedi, en malplej bona veki abomenon, suspekton, malsaton, malamon.

Epiloge, afabla leganto pardonu, ke jen mi estas alportinta eble nenion novan al nia merkato. Sed la "pravaj veroj" meritas esti regurdataj ...

J.Kavka



Estimataj gesamideanoj!

Mi havis feliĉon viziti Ĉeĥoslovakion. Mi partoprenis kelkajn E-arangojn, vizitis miajn korespond-amikojn. Mi sendas al vi fotojn pri ILEF. Ĝin partoprenis gesesperantistoj el GDR, Hungario, Bulgario, Italio, Sovetunio. Vi vidas en la asocia domo parton de la partoprenantoj dum unu el vesperaj koncertoj. Mi estis ege kontenta pri mia vojaĝo al Ĉeĥoslovakio. Mi konatiĝis kun multaj bonaj esperantistoj ĉeĥoslovakaj kaj alilandaj.

Mi deziras al vi pluan prosperon en via poresperanta agado.

Samideano

Svetlana Pogorelaja

Soveta Unio, SU-252 035
Kiev - 35, ul. Urickogo
d. 19 kv. 73

RAVE ravis, sed ...

En la tagoj 29.9.-1.10.1989 okazis internacia Renkontiĝo Amikeca en Vyškov - Esperantista, do mallonge RAVE. La renkontiĝon partoprenis gastoj el GDR kaj MLR. Vendrede post alveno kaj loĝigo de gastoj en internulejo de domkonstrua metilernejo okazis en salono de Sindikata klubo interkona vespero. Komence iom da muziko el magnetofono, poste jam sekvis babilado kaj kantado de esperantaj kantoj aŭ laŭ multoblighita minikantareto aŭ laŭ kantaretoj, kiujn alportis s-ro Kereszhegyi el Budapeŝto, prezidanto de MEM sekcio de HEA. Sabate antaŭtagmeze vizitis la partoprenantoj muzeon en naskiĝdomo de Klement Gottwald en Vyškov - Dědice. La ekspozicio kaj diversaj detaloj el la vivo de ĉi tiu nia grandulo ekinteresis ĉiujn, precipe eksterlandanojn.

Poste sekvis ekskurso per liniaj aŭtobusoj al proksima urbo Kroměříž. Tie okazis trarigardo de kastelo kun ampleksa galerio kaj belaj florgardenoj. Post reveno ĉiuj denove renkontiĝis en la salono de Sindikata klubo por la vespera programo. Por danco kaj auskultado muzikis malgranda blovorkestro. Inter la muziko aranĝis unu programon s-ano Drahomír Kočvara el Ostrava, nome lumbildan prezentadon pri la laboro de MEM sekcio kaj UK en Lucerno. Kiam finis la orkestro, daŭris ankoraŭ amuzado per kantado kaj gaja babilado.

Dimanĉa antaŭtagmezo estis dediĉita al urborigardado kun vizito de muzeo de Vyškov-regiono. La ekspozicio plaĉis al ĉiuj kaj surprizis ilin ĝia amplekso. Tiutempe okazis en ekspozicia salono de la muzeo ekspozicio de fruktoj kaj legomoj, plantitaĵ de membroj de loka gardenista organizo. La vizitantoj povis bedaŭri, ke ili rajtis "gustumi" la eksponaĵojn nur pere de okuloj. La renkontiĝo finiĝis per la tagmanĝo kaj la partoprenantoj esprimis esperon, ke ili povos ankoraŭ veni al Vyškov partopreni la sekvantan renkontiĝon.

Ĝis ĉi tiu ŝajnas esti ĉio en ordo kaj la renkontiĝo plensukcesa. Sed ankoraŭ ne estis mencio pri nombro de partoprenantoj. Kaj tio estis tre grava problemo, kiu preskaŭ malebligis arangi la renkontiĝon. Ni esperis, ke entute estos almenaŭ 40 partoprenantoj, kiuj plenigos la aŭtobuson por ekskurso. Sed la realo superis ĉiujn niajn esperojn. Nekalkulante la lokajn samideanojn, venis entute 12 partoprenantoj. Kelkaj aligiloj kaj petoj pri informoj venis jam post fermo de la aligiloj, nur antaŭ la renkontiĝo venis ankoraŭ malaligoj. Venis problemoj kun tranoktado, ĉar "por tiom malgranda grupo ne indas, ke estu deĵoranto" /la internulejo, kie estis rezervita la tranoktado, ne estas publika tranoktejo/, estis necese nuligi ekskurson al Moravia karsto, ĉar ne sukcesis eĉ la provo okupi la liberajn lokojn de la aŭtobuso per neesperantistoj. Anstataŭ ĝi estis lastmomente aranĝita la supre menciita ekskurso, kiun estis eble plenumi per liniaj aŭtobusoj. Aperis problemoj, ĉu malmendi la orkestron por la sabata vespero. Ankoraŭ okazis kelkaj pli malgravaj ŝanĝoj pro malmulte da partoprenantoj. Ni jam timis, ke la sankta Petro diros, ke por tiom malgranda grupeto ne indas, ke lumu la suno. Sed tamen dimanĉe la suno rigardis nin el inter la nuboj. Ĉu ni malmulte propagandis la renkontiĝon? Estis dissenditaj kaj disdonitaj ĉirkaŭ 200 invitiloj kun aligiloj, informoj aperis en asociaĵ "Informace" kaj en brna "Bulteno". Se ne venis pli multe da eksterlandaj gastoj,

tion eblas kompreni. Ankaŭ tion, ke Fraha estas sufiĉe malproksime de Vyškov. Sed ke venis neniu el Sudmoravia regiono krom unu partoprenanto el najbara klubo kaj unu plua, tio estas stranga. Neniu el forta brna klubo, eĉ promeso de juna vino el suda Moravio por la sabata vespero restis nur promeso. Kiel ni spertis, estos necese por eventuala venonta renkontiĝo kalkuli ankaŭ kun ebleco de malmulta partoprenantaro.

Ni volis pere de renkontiĝo propagandi E-kurson por komencantoj, sed tio ne sukcesis. Kelkaj aŭisoj por la sabata vespero ne allogis neesperantan publikon. Pro malmulta esperanta partoprenantaro ni devus eĉ pli honti ol fieri.

Krome, nia kesto sur la placo devis esti forigita pro la riparo de la domo antaŭ la renkontiĝo kaj ankoraŭ en oktobro ne finiĝis traktado pri ĝia nova lokigo.

Kaj la lasta informo el Vyškov - estis ŝanĝita tago de kunveno de nia rondeto - anstataŭ merkredo ni renkontiĝas marde en la klubejo de Sindikata klubo sur la strato Havlíčkova 24 en la horo 16.30.

Ing. Josef Vojáček

● Somera ● Esperanto ● Tendaro

Ĉi jare la 3-an etapon de Somera-Esperanto-Tendaro Lančov 30.7.-12.8. partoprenis 140 partoprenantoj el kvin landoj. Eksterlandanoj alveturis: el Bulgario 19 personoj, Sovet-Unio 6 personoj, Hungario 5 pers. kaj Germanio 4 personoj. Por partoprenantoj estis preparita riĉa kaj interesa programo. Matene post matena gimnastiko kaj matenmanĝo ĉiuj lernis kvar horojn en kursoj: A1 - A5 por komencantoj, B - por progresantoj, C - konversacia kurso, D - por instruistoj. La kvinan horon ni komune kantis esperantajn kantojn. Posttagmeze ni povis partopreni diversajn ekskursojn. Ni vizitis la kastelon Vranov. Tie ni vidis belegan teatraĵon. Ni ankaŭ ŝipveturis el la Arĝenta Golfo apud Lančov ĝis la kastelo Bítov. Ni ekkonis romantikajn kaj naturajn belecojn de la Vranova valbarajo. Autobusa ekskurso en Třebíč estis ankaŭ interesa. Ni admiris la Třebíčan Betlehemon kaj la faman bazilikon. En la urbeto Hroznatín naskiĝis generalo Svoboda. Ni vizitis lian muzeon.

Al infanoj plaĉis karnavalo kaj la konkuroj MISS Lančov, Simpatiuo Lančov kaj Intertalentoj 1989. Vespere estis tendarfajroj. Kursoj preparis programojn kaj ĉe tendarfajro ni kantis kaj amuzis nin. Tre interesa estis vespero de demandoj kaj respondoj. Eksterlandanoj respondis niajn demandojn. Ni multon eksciis pri vivo en iliaj landoj. Kiam vetero ne favoris nin, vespere samideano Kočvara prezentis lumbildojn kaj paroladon pri historio SET Lančov, pri UEA-kongreso en Luzern. La soveta samideano Kotelnikov parolis pri E-movado en Sovet-Unio. Li prezentis lumbildojn el E-renkontiĝoj en lia lando. Samideanino Rýznarová prezentis lumbildojn el Roterdamo kaj Francio. Ŝi bone zorgis pri infanoj dum instruado en A1 kurso. El la urbo Plzeň vizitis SET 6 homoj. Ni ĉiuj esperas, ke ni denove tien revenos.

Vlasta Zýková, Plzeň

Cu iu ankoraŭ ne scias, kio estas I T R E E ?

Por venonte mi rekomendas: Venu! Vi vidos, vi scios.

Kio ĝi estas?

Mi povus simple ekspliki unuopajn literojn:
INTERNACIA TURISMA RENKONTIĜO DE ESPERANTISTOJ EN ERCMONTARO.

Kiam ĝi okazis?

Pasintjare ĝi okazis de la 17-a ĝis la 23-a de septembro kaj estis jam la 12a.

Kie ĝi okazis?

Kompreneble, ke en Ercmontaro en la ĉeĥa flanko en ĉelima urbeto Boží Dar.

Kial en Ercmontaro?

Car ĝin aranĝadas ĉiujare alterne unu jaron en la germana flanko, alian jaron en la ĉeĥa flanko en kadro de ĝemeliga kontrakto de esperantistoj, kiuj logas aŭ en Ercmontaro aŭ sub ĝiaj deklivoj, la Esperantoklubo en Karlovy Vary kaj Esperanto-klubo en Schwarzenberg.

Kio estas Ercmontaro?

Germane oni ĝin nomas ERZGEBIRGE, ĉeĥe KRUŠNOHŮŘI, kaj ankaŭ ekzistas jam preskaŭ forgesita sed ankaŭ taŭga nomo RUDOHŮŘI. Ambaŭ ĉeĥaj nomoj rilatas al iama minado de diversaj ercoj /"erco" - ĉeĥe "ruda", "kruchati" en malnova ĉeĥa lingvo egalas al "minadi"/. Ercmontaro estas natura limo inter du ŝtatoj GDR kaj ĈSSR. Ĝi ne estas nur nomo de iu ajn montaro. Ercmontaro - tio estas historio de du ŝtatoj, de du nacioj, kiuj ĉi tie vivas kaj jam delonge vivis - jen pace - jen malpace. Ercmontaro estas montaro de iamaj konfliktoj kaj kunlaboro inter la homoj de ambaŭ nacioj jam ekde la komenco de minada tempo - fama epoko de arĝento, stano kaj aliaj ercoj komence de la 16-a jarcento. Ercmontaro estas ankaŭ montaro de iamaj komunaj bataloj de laborista klaso de Ĉeĥoj kaj Germanoj kontraŭ kapitalistoj kaj poste ankaŭ kontraŭ faŝismo.

Kia estas Ercmontaro?

Same, kiel aliaj montaroj ankaŭ Ercmontaro estas bela, ĝi havas sian specialan belecon, ĝi havas siajn valojn inter arbutitaj deklivoj ...

Kio estas en Ercmontaro interesa?

Ercmontaro havas sian historion, mezepokajn urbojn kaj multajn signifajn lokojn, kiuj al hodiaŭaj homoj povas multon diri. En Ercmontaro estas ankaŭ belvidejoj, el kiuj estas videblaj valoj pribrilitaj per la somersuno, iam ankaŭ kun malhelaj ombroj. En Ercmontaro estas ofte malagrabla vetero, sed iam ankaŭ sunplenaj tagoj - vintre blankaj, printempe verdaj, aŭtune buntaj laŭ arbaĵfolioj, kiuj atendante sian finon kolorigas kvazaŭ ili volus al ni montri, ke en la mondo ekzistas ĉio nur por ĝojo... kaj tio ĉio estas sama en ambaŭ flankoj de Ercmontaro.

Kial mi ĉi tion rakontas?

Ĉar mi volus diskonigi la kaŭzon de la Ercmontaraj renkontiĝoj kaj ankaŭ iliajn celojn. La celoj estas:

- 1/ ekkoni kaj ekscii ion pri vizitataj lokoj dum promenoj;
- 2/ interkonatigi kaj amikiĝi kun la partoprenantoj;
- 3/ praktike eluzi la lingvon Esperanto.

Kiuj estas la ĉefaj punktoj de la programo?

- promeni kaj piedekskursi tra la ercmontara naturo,
- viziti interesajn lokojn aŭ pro ilia historio aŭ pro aliaj interesajoj,
- ĝui amikan medion kaj interparoli Esperante.

Kiuj partoprenantoj volonte venadas al la renkontiĝoj?

Ĉiam venadas bonaj kaj veraj esperantistoj, kiujn ĝojigas sincera medio, venadas naturamikoj, ĉeĥoj kaj Germanoj, kiuj amas siajn patrujojn kaj volas ekkoni ankaŭ diversajn angulojn, kiuj en ĝi estas, venadas tiuj, kiuj volas pace kunvivi kun siaj najbaroj kaj denove kaj ripete venadas tiuj, kiuj volas revidi geesperantis-tojn kaj bonajn amikojn.

Kiujn personojn mi konkrete nomu?

Ili estas jam multaj - la pago estus tro malgranda por nomi tiujn, al kiuj ni diras, ke ili farigis "fideluloj - Intree-anoj". El la germana flanko ne mankas geedzoj Eichler, geedzoj Dittrich, Dr-o Erner, s-anoj Weiss, Neubert kaj aliaj, el la ĉeĥa flanko s-anino Zykova el Plzeň, s-ano Holeček el Most, s-ano Toman el Jaroměř, geedzoj Filip el Přerov kaj aliaj. Alvenadas ankaŭ multaj el pli malproksimaj lokoj kaj el aliaj landoj, ekz.: el Ŝovetunio, Pollando, Hungario, Bulgario, antaŭ kelkaj jaroj venis ankaŭ s-anino el alia kontinento - el Kanado.

Ĉu venis ankaŭ tiuj, kiuj Esperanton ankoraŭ ne konas?

Jes, ankaŭ tion ni jam spertis, sed tio estas kompatinda afero, pri kiu oni malfacile parolas. Feliĉe, ke tio ne okazas tro ofte.

Kia estis la vetero dum pasinta renkontiĝo?

Nia renkontiĝo komencigis dimance la 17-an de septembro kaj sabate ankoraŭ pluvis, estis densaj nuboj kaj sufiĉe akra vento. Sed jam dimance posttagmeze aperis la suno, kiu varmigis la aeron kaj brilis ĉiutage ĝis fino de la renkontiĝo. Certe al esperantistoj apartenas favoro de la suno.

Ĉu por esperantistoj ludas tiel gravan rolon la vetero?

Ni esperantistoj jam multfoje spertis, ke dum malbona vetero regis inter esperantistoj ĉiam amika kaj agrabla etoso.

Kiujn lokojn fakte la partoprenantoj vizitis, kie ili vagis?

Ni vizitis la plej altan pinton de la tuta Ercmontaro Klínovec, de kie ni ĉirkaŭrigardis al ĉiuj direktoj, ni promenis laŭ la instrua vojo tra la parto de ŝtata natura rezervejo "Torfejo de Boží Dar", ni piediris al urbo Jáchymov. Ni ekskursis ankaŭ pli malproksimen ekz. al burgo Loket, kiu troviĝas sub Ercmontaro ĉe la rivero Ohře, ankaŭ historian monaĥejan bibliotekon en Teplá, banurbojn Karlovy Vary kaj Mariánské Lázně.

Dum la pasinta lernoĵaro finis sukcese ĉe kursgvidanto Helena Štruncová

la korespondan kurson de Esperanto por komencantoj (Ĉeĥa Esperanto-Asocio)

B u ŝ k o v á Věra, 47113 Nový Oldřichov 96
D o l e j š Jaroslav, 25. února 5, 40801 Rumburk
H a n u š o v á Růžena, 55203 Zlín 13, Ĉ. Skalice
K r y t i n á ř o v á Věra, Leninova 146, 35761 Březová
M u d r o v á Věra, Tachovská 37, 32325 Plzeň
P r o c h á z k a Pavel, Běloruská 2169, 39701 Písek
R a k o v á Věra, Pertoldova 3327, 14300 Praha 4
V o b o ř i l o v á Kateřina, Vít. února 38, 12000 Praha 2
V o p a t Miroslav, 33141 Dřevce 10, Kralovice
J U D r J i r m a n o v á Miroslava, Kostecká 1829, 54701 Náchod
A n d r á ŝ k o v á Marcela, Zelenky Hájského 8, 13000 Praha 3
Ĉ e j d á k o v á Eva, Hvězdoslavova 31, 10100 Praha 10
D r o b n á Marie, Tylova 845, 41002 Lovosice
F i l i p o v á Eva, Zárubova 511, 14018 Praha 4
I n g. F r ů h a u f o v á Jana, Dukelská 630, 39102 Sezimovo Ústí II
I n g. G r o b e c Josef, Gregorova 18, 70200 Ostrava I
H á j k o v á Ludmila, 68302 Habrovany 71
H o l e č k o v á Gabriela, Zahrádkářská 544, 50311 Hradec Králové
P i š t á k o v á Dana, Polomí 66, 79856 Bohuslavice u Konice
P o s p í š i l Richard, Glowackého 551, 18100 Praha 8
S l a t i n s k á Hana, Zárubova 507, 14018 Praha 4
S o c h o r Lubomír, Kladská 109, 50342 Hradec Králové
S o m o l o v á Emilie, Sokolovská 161, 18000 Praha 8
S ý s o v á Erika, Nádražní 470, 59301 Bystřice n. Pern.
Š l a j e r o v á Věra, 26761 Drozdov 5, Cerhovice
V a l k o v i č o v á Beáta, Leningradská 3112, 27204 Kladno
V e v e r a Jiří, Gagarinova 1186, 36222 Nejšdek
L e b e d o v á Dana, U plynárny 73, 14000 Praha 4

la buŝan kurson de Esperanto por progresantoj (Esperantista Klubo Praha)

B a g a r o v á Irena	Z i k m u n d o v á Zdenka
B i m a n Vladimír	P i š t í k o v á Vlasta
B u r e š o v á Blanka	Doc. dr. Ĉ e c h o v á Lilla
D u f k o v á Alena	L á s k o v á Blažena
R N D r. K a m b e r s k á Zuzana	P l e s k o t o v á Olga
K ř i v á n e k Václav	R e i c h l o v á Františka
R a k o v á Věra	I n g. L i š k a Jaroslav
R o h a n o v á Eva	S k a l i c k á Jitka
I n g. S a x l Antonín	S t ě n i č k o v á Jaroslava
S l á d k o v á Jana	Š t e f l Pavel
S o j k a Josef	Š v a r n á Otilie
S o u č e k Dalibor	Š m r Š v e h l o v á Taťana
V a n ě č k o v á Alena	V o n d r u š k a Pavel
D r. W e i g o v á Stanislava	K o p e c k á Anna

Ĉiuj el Praha

Koran gratulon al ĉiuj!

SOLENA PARIZO

En la jaro 1989 celebris la tuta Francujo 200-an datrevenon de la Granda Franca Revolucio 1789. Multe da turistoj /oni supozas, ke estis 70 000 000 pasintjare/ venis ĉefe en Parizon kaj volis rigardi ĉion interesan. Ankaŭ mi havis feliĉon kaj povis viziti la Urbon de lumoj guste antaŭ la granda soleno 14.7.

Majoritato da historiaj memorindaĵoj vestis sin en novan robon. Oni origis p.e. denove kupolon de La Invalidejo, kie ripozas Napoleono, lia filo "Agletto" kaj aliaj personoj. Sole kelkajn paŝojn de ĉi tie troviĝas domo, en kiu loĝas en du supraj etaĝoj tre konata aktoro Alan Delon. Parizo estas jam hodiaŭ nepensebla sen La Eiffelturo. Granda lumanta surskribo anoncas, ke ĝi transpaŝis ĵus 100 jarojn. Tiun ĉi rondigitan "naskiĝtagon" festas ankaŭ populara kaba-reto Moulin Rouge.

Solena prezentado "Formidable" /Belega/ loĝas ĉiu-vespere multe da artŝatantoj. Dancojn kaj kantojn kun arabaj motivoj alternas Vienaj valsoj p.e. "La nokta papilio" de J. Strauss. La fino apartenas al la ĉefurbo - la podion abundigas kantistoj, dancistoj kaj akrobatoj, super la rigardejo ekbrilas duopo da malgrandaj Eiffelturoj, en kiuj estas kroĉintaj du beljunulinoj. Horloĝo finsonigis noktomezon kaj ni revenas en nian hotelon. Sed en stratoj regas ankoraŭ viveca multmovado. Ŝajnas, ke Parizo neniam iras dormi.

Tre bela estas vespera promenveturo per boateto "Bateau-Mouche" sur Seine. Oni preterpasas Nacian deputitaron, Tuilerie-gardenon, du insulojn: L'Île de la Cité kun Notre-Dame - glora pere de la verkisto Victor Hugo kaj L'Île St. Louis, oni reiras al la Eiffelturo kaj la ponto "Pont de Grenelle", antaŭ kiu staras unue naskita fratino de la Statuo de la Libereco en Nov-Jorko. Tiu ĉi horo pasis por mi tre rapide, ĉar mi pasigis ĝin ne nur en agrabla kunularo de rimarkindaj memorindaĵoj, sed ankaŭ en dialogo kun pli aĝa Belgino el Gento, kiu parolis Esperante. Tia renkonto estis por mi vere plezura surprizo.

Duan tagon ni vizitis komune la bazilikon Sacré-Coeur, kiu estis konstruita en la jaro 1919. Proksime de la blanka bela konstruaĵo troviĝas La placo Tertre, kie multe da pentristoj prezentas sian arton. Ĉefe eksterlandaj turistoj interesiĝas pri portretoj, kiuj estas sufiĉe multe kostaj /200-300 fr./. Sed se vi havos feliĉon kaj renkontos, kiel mi, Caŭdon de Jugoslavio, vi pagos sole 100 fr. Nun mia portreto pendas en mia ĉambro kiel ĉarma rememoro al Parizo kaj simpatia viro Caŭdo.

Antaŭlastan tagon de nia restado oni entreprenis ekskurson en Normandio. Ni vizitis urbojn Rouen, Honfleur, Deauville kaj Trouville. Rouen kun La Katedralo Notre-Dame /pli malgranda kaj pli mallarga ol en Parizo/ kaj La Preĝejo de Johanino de Arko tre plaĉis al mi. Sur la loko kie Johanino estis brulmortigita, troviĝas nun sia statuo kun multaj floroj. Tegmento de la moderna preĝejo simbolas mortigan fajron kaj ondojn de la proksima maro. Honfleur estas malnova haveneto kun la antikva Preĝejo de la Sankta Katarino kun du altaroj. Domoj en apudmaraj urboj ne estas stukitaj per stuko, sed per ardezo kontraŭ la humido.

Mian unuafojan banadon en la maro memorigas al mi nun 6 amindaĵoj konketoj.

La semajno pasis vere rapide kaj oni devis denove reveni hejmen. Mi forlasis la urbon de koloroj BLUA-BLANKA-RUĜA kun multaj impresoj. Ankoraŭ longe mi rememoras ĝian solenan atmosferon.

Jana Chaloupková

GEAVA ALVOKO!

Post pripensado dum ĉijaraj festotagoj de nia ĉefa E-asocio mi devis konstati, ke ni tro malmulte eluzas disvatiĝon de nia movado en niaj familioj. Certe, mi scias, ke nia mezaĝa generacio de gepatroj ofte ne havas multe da tempo por instrui siajn infanojn nian karan lingvon, kvankam ili estas esperantistoj.

Ni geavoj aŭ prageavoj, ofte jam pensiuloj, havas pli da tempo kaj precipe da pacienco kun niaj genepoj. Do ni provu esperantigi kaj samtempe verdigi almenaŭ unu animon el niaj genepoj dum la plej frua ago, simile kiel oni lernigas gepatran lingvon. Memkompreneble sen necesaj aŭ utilaj vangofrapoj dum la instruado kaj lernado de mondaĵ lingvoj.

Mi pensas, ke ne estas racie nur ĉiam denove esperantigadi novajn unuopulojn kaj ne eluzi familiajn rilatojn. Ja, la familia medio savis multajn lingvojn, inkluzive de nia gepatra lingvo, kaj kauzis ilian novan ekfloron.

Ni provu eluzi nian asocion por la propagando de nia geava ideo kaj registru geavojn kaj iliajn genepojn. Ĉu almenaŭ unu el niaj geavoj troviĝas, kiu zorgus pri la organizaĵ aferoj?

Ni povus organizi renkontiĝojn, respondecan korespondadon kun similaj genepoj enlande kaj eksterlande. Se ni sukcesos, do ni povas inspiri ion similan ankaŭ en aliaj landoj. Tio povas esti ne nur utila, sed ankaŭ tre interesa por nia geneparo.

Karaj geavaj gesamideanoj, mi atendas vian reagon kaj proponojn. Mi tion ekprovas kun mia nepino, kiu nun komencis la unuan klason de la fundamenta lernejo. Samtempe mi volas senkaŝe tiel iomete pagi mian ŝuldon al nia nobla verda movado.

Do provu viajn lastajn fortojn, maljunulaj geavoj, nia juneco pere de nia plej juna generacio venkos.

Al la venko de nia juneco!

Avo Ing.JUDr.Miroslav Tůma,CSc.
Nový Jičín

RESPONDO

=====

je la recenzo de B. Golden: "Ĝustigo de lingvaj eraroj en sociologia raporto", aperinta en STARTO 4/89.
La cititan 57 paĝan verketon-studon eldonis Ĉeĥa Esperanto-Asocio en la jaro 1981. Tradukis Josef Vondroušek.

La unuopajn punktojn de la recenzo mi provas respondi.

1. Manko de akordo de adjektivo kun substantivo. "Ĉiu demando enhavis 13 fundamentajn demandojn, koincidantaj laŭenhave kaj stile ..."
Laŭ modeloj: "mi trovis lin homo loĝala", "mi vidas la urbon granda" la citita frazo estas gusta. Ĉu same gusta /kaj malgusta/ estas la frazo el la libro "Hierau ...", paĝo 17: "li vidis iun klinanta sin ..."
2. "Interesa nur estas ..."; tie elfalis la vorto "afero". Same preseraro estas: "evoluiĝi". De kiam oni kalkulas preserarojn debete al la traduko kaj pro ili dubigas valoron de la tuta verko?
4. Se estis uzita la vorto "domaĝi" do konvenas "domaĝi".
Se estis uzita la vorto "dume" devas esti laŭ la originalo "dume".
6. "Plivere", ĉeĥe "spíše" estis ĝuste kaj prave uzita.
7. La vorto "verifi" estas utila, ĝi estas uzata dum jaroj, ĝi troviĝas en bonegaj vortaroj kiel de R. Hromada k.a.. Kaj se ankoraŭ ĝi ne troviĝas en PIV, do baldaŭ ĝi tie aperos.
"Adjudiki" estas esprimo komerca, sed ankau el fako administra. Ĝi estis ĝuste uzita laŭ la originalo.
Sed la vorto "riposti", "artefakto" ne troviĝas en PIV, la vorto "overalo" troveblas nek en PIV nek en Suplemento / La vortoj el la libro "Hierau ..." de B. Golden.
"Mi ne priskribos ĉiujn erarojn, kiujn mi trovis ..." estas flanke de B. Golden kotĵetado. Kontraŭ liaj recenz-moroj jam aperis pluraj protestoj kaj malaproboj en Esperanto-gazetoj.

Josef Vondroušek

Esperanto-moneroj en Kubo

La kuba entrepreno pri monstampado de Kubo eldonos du monerojn omaĝe al la 75 UK de Esperanto okazonta en Havano de la 14a ĝis la 21a de julio 1990.

Teknikaj konitaĵoj:

Argenta monero
metalo: argento 0,999
kvalito: semi-proof
diametro: 38 mm
pezo: 16 gramoj
kvanto: 6000
valoro: 5 pesoj
prezo: 30 USD

Nikellkupra monero
metalo: nikellkupro - 75 % Cu, 25 % Ni
kvalito: BU
diametro: 30 mm

kvanto: 6000
valoro: 1 peso
prezo: 3 USD

Dato de emisio: marto 1990

Prezoj estas fiksitaj en usonaj dolaroj, sed pagendaĵ en germanaj markoj, britaj pundoj k.a., sed ne en usonaj dolaroj. Por sendoj per registrita poŝto oni krompagu 3 USD por Euro-po.

Jubileo de Eva

Eva Seemannová solenas ĉi-jare gravan datrevenon de sia naskiĝo. Ni ĉiuj konas la jubileantaron kiel aktorinon same eminentan ĉeflingve kiel Esperante, kies velura voĉo karesas niajn orelojn ĉiam, kiam niaj kluboj enprogramigas sian prezentadon en siaj arangoj. Kun nekredeble juneca maniero ŝi recitas poemojn kaj prezentas monologojn, ofte skribitajn por ŝi de gravaj aŭtoroj (Lazecký, Dub, Urbanová k.a.). Ankaŭ siaj tradukoj Esperanten estas artaj verkoj. Nu, ni ne miru, ĉar ŝia instruisto estis la fama prof. Hromada kaj la ŝtatan ekzamenon pri Esperanto kun la rezulto "eminente" ŝi faris antaŭ kvindek jaroj. Estante knabino konatiĝis nia kara Eva kun la glora poeto Julio Baghy, kiu iniciatis ŝin fondi teatron grupon tiuvorte: "... Mi revis pri organizado de aktortrupo por migre viziti la grandajn urbojn de la mondo por prezenti artajn vesperojn ... mi volis organizi trupon kun la nomo "Verda ĉaro". Nu, intervenis la milito kaj ... kaj mia revo restos por la posteuloj, eble por vi ... Ĉu vi ne volus transpreni tiun taskon?" Eva entuziasmiĝis por la ideo, kiun ŝi sukcese realigis en la jaro 1954. Tiel naskiĝis la Verda ĉaro de Julio Baghy, kies motoro estis Eva, multe helpata de sia posta edzo, reĝisoro A. Seemann.

Danke al la talento, sindonemo, lingvokono kaj senlaca laboro de nia jubileantino baldaŭ rikoltadis la Verda ĉaro grandan sukceson ne nur en nia lando. La plej sukcesa prezentado estis Pigmaliono, kie ŝi eminentis ne nur pro la bonega traduko de la verko, sed ankau pro la prezentado de la plej grava rolo. Certe la partoprenintoj de la 44-a UK en Varsovio rememoras... Menciindas ankau la prezentado de Legendo pri amo (1958) kies belsona traduko de Eva tiom ravis la persone ĉeestantan aŭtoron, gloran Nazim Hikmet, ke li donacante al Eva bukadon da ruĝaj rozoj, eldiris tiujn ĉi vortojn: "Ŝajnas al mi, ke mi verkis la ĉefrolon por vi."

Kion aldoni? Ke ĉio ĉi estas jam fama historio. Tamen Eva, ankoraŭ ĉiam verva aktorino, senlace feliĉigas per sia arto kaj ĉeĥajn kaj Esperantajn spektantojn, ĉar ŝi, tia eta, plej modesta virino, ankoraŭ ĉiam flustras kaj tondras siajn monologojn de sur podioj diversurbaj kaj neniam rifuzas petojn de la E-klubo au ĈEA riĉigi la programon de Esperantaj arangoj. Kaj tie ŝi ravas kaj kortuŝas same la junajn kiel la maljunajn per sia dolĉa voĉo.

Kara Eva, akceptu en la nomo de ĉiuj ĝesamideanoj dankon, gratulon kaj deziron de multaj pliaj aktivaj sukcesplenaj jaroj.

(H. Štruncová)

Verso kaj larmo de Eli Urbanová

En la jaro 1986 aperis ĉe eldonejo Iltis en Saarbrücken poemaro "Verso kaj larmo" de Eli Urbanová. Jen kion pri la nova poemaro skribis la recenzisto de Bulgara Esperantisto Georgi Mihalkov:

Mi ne povas imagi nian lingvon sen la originala poezio. La poezio donas la animon de la lingvo, riĉigas ĝin. Feliĉe, de "Ho, mia kor" ĝis nun oni ne ĉesis krei poezion en Esperanto. La Lingvo Internacia allogis plurajn poetojn, aŭ vekis la poezion en multaj, kiuj eklernis ĝin. Multaj restis fidelaj al la originala Esperanto-poezio kaj unu el ili estas Eli Urbanová.... Nun, kiam en niaj manoj estas "Verso kaj larmo", la plej nova poemaro de Eli Urbanová, ni surprize rimarkas, ke jam tridek ses jarojn ŝi aktive ĉeestas en nia literatura kaj kultura vivo. Ŝi estas unu el tiuj niaj poetinoj, kiujn oni tuĵ rimarkas. Dum tridek ses jaroj Urbanová ellaboris sian originalan poezian stilon, kiun ne eblas ne rekonii....

Legante ŝiajn poemojn el "Verso kaj larmo", mi denove demandas min, kio ĝuste estas la kialo, ke Urbanová apartenas al la nombro de plej elstaraj Esperanto-poetinoj. La respondo certe estas - ŝia profunda sento pri la poezio. Urbanová naskigis poetino, sed ne ĉiam tio sufiĉas, kaj mi opinias, ke pli gravas la fakto, ke ŝia poezio estas sincera, profunde konfesa poezio. Tion sentas mem la poetino, ĉar en ŝia poemo "Kiam mi versas" ŝi atentigas nin:

"Kaj mi pri amo kaj mi pri tomb,
kiam mi versas, estas mi seksbomba.
Jes, hazardema, ekstra personec,
Mi min disdonas po poem, po pec."

.... Eli Urbanová estas originala poetino ankaŭ el vidpunkto de la poezia formo.... Ŝi majstre aplikas en ŝiaj poemoj la aliteracion kaj asonancon. La ritmo, kiun ŝi elektas, ĉiam plene konvenas al la enhavo.

"Verso kaj larmo" estas nova renkontiĝo kun poetino, kiun la Esperanto-legantoj ŝatas kaj en kies poemoj ili trovas gojon kaj konsolon, ĉar la poemoj de Urbanová estas antaŭ ĉio sinceraj koraj konfeso.

En L'esperanto 4/1987/ Aldo de Giorgi skribis jenon:

En la esperanta literaturo, aparte en la kampo de poezio, vere nemultaj poetinoj povas esti rigardataj kiel grandaj artistinoj de la verso, sed kelkaj povas trankvile rangigi inter la plej grandaj absolute, kompare ne malsuperaĵoj al la plej akklamataj viraj nomoj de nia jarcentlonga versarto. Inter tiuj mi ne hezitas inkludi la autorinon de la ĉi-recenzata libro, la ĉeĥan poetinon Eli Urbanová. Kune kun la elstare granda Marjorie Boulton, kaj apud nia Clelia Conterno, ŝi reprezentas la moŝtan triopon de nia verda poezio /en ĉi tiu pritakso mi ne enkalkulas la verkistinojn, kiuj okupiĝas precipe pri tradukado/.

"Verso kaj larmo" estas la tria poemkolekto de Eli Urbanová, kaj ĝi povas esti taksata antologia verko, inkluzivante poemojn el la antaŭaj libroj kaj aliajn tute novajn.

La ĉefaj trajtoj kaj kvalito de la poezio de E.U. estas ŝia ekstrema originaleco, kaj forma kaj enhava. Laŭ la temoj, ŝia poezio estas grandparte subjektiva kaj enversigas travivaĵojn, emociojn, intuiciojn, korrupciojn tipe virinajn. Sed sen la kutimaj siropaj vadoj de multaj ŝiaj koleginoj. E.U. estas homo kun fortaj kaj intensaj sentoj, kune kun malkonvencia kuraĝo; ŝiaj sopiroj estas liraj melodioj sed ankaŭ plenkordaj hurloj, ŝiaj emocioj estas sopranaj kantoj sed ankaŭ verrivelaj skrapoj. Kiam ŝi kantas la amon /ĉeftemo ŝia/, ŝi interpretas ĝin senkompromise, sentabue, el ĉiuj vidpunktoj: anima, korpa, estetika /pasio turbulentas, nirvanas kaj detruas/. Jen ekzemplo.

Travivi amon freneze skuan,
dangeran, krudan kaj detruan,
kiu ne timus eĉ mortigi!
Ekvivi forte! Ho, ami ree!
Perdiĝi tute, memperee
en sankta fajro de pasio!

Do, poezio esence lirika sed draste efika, senpruda, kun tonoj reĉantaĵ la Sepfoajn odojn kaj la denuncojn de la poetoj de "beat generation".

Laŭ la formoj, la poezio de E.U. estas tre persone originala. Ŝi versas ĝenerale laŭ metrikaj skemoj, rime, tamen, ne stereotipe, ŝiaj metroj estas tre variaj, ofte personaj inventaĵoj, kun pluraj tuŝoj de surpriza originaleco....

Resume do, ĝuinda, nepre leginda poemaro, taŭga por ĉies gustoj, sen la kaprompaj esoterajoj de kelkaj modernaj pseudavangarduloj /ankaŭ el ŝia lando/ sed ankaŭ sen la naivaj kaj eksmodaj banalaĵoj de tro multaj epigonoj de nia pionira poezio. Libro, kiu devus fariĝi propraĵo de ĉiu poeziamanto.

Kaj fine ekĝemo de ĉeĥa esperantisto: la libro ne estas aĉeteb-la en Ĉeĥoslovakio.

red-

JOSEF RUMLER SENNEOLOGISME

La literatura sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Praha eldonis la publikaĵon titolitan NUNTEMPAJ ĈEĤAJ POETOJ EN 1000 VERSOJ. Ĝi enhavas entute 52 poemojn ĉiam spegule en la ĉeĥa kaj Esperanta lingvoj. La klasika ĉeĥa poezio tradukitis ofte, sed tiu ĉi publikaĵo prezentas ĉiujn samtempajn ĉeĥajn poetojn ekde poetino Bernardinová ĝis Žáček. Tiu ĉi riĉa paletro ne reduktis nian samtempan poezion je kelkaj eminentuloj kiel okazas normale. La ĉeĥa originalo kun paralela traduko Esperanten prezentos por niaj legantoj tre utilan supervidon pri la tuto de nia aktuala poezio kaj ebligos al neesperantistoj, ĉefe al tradukistoj profesiuloj priiĝi la precizecon, sonorecon kaj ĝenerale la estetikajn valorojn de la tradukoj. Neesperantista publiko ĉeĥa povas studi kompara

kaj praktike la strukturon kaj vorttrezoron kaj poetikon de Esperanto, prijuĝi la rilaton inter senco, enhavo kaj formo kaj eŭfonio de la lingvoj ĉeĥa kaj Esperanta. La ĉeĥaj esperantistoj akiris tre utilan hel-pilon kaj modelon okaze de iliaj provoj tradukadi la modernan poezion. Ili povas supervide ekkoni ĉiujn poetojn, kiuj s a m t e m p e verkas en nia ĉeĥa lando poezion.

La tradukisto bone elektis la poemojn kaj la publikaĵo povas mult-flanke esti uzita en programoj de kultura karaktero. Josef Rumler doku-mentis, ke li scias verki kaj traduki SENREDUNDE kaj ABUNDE, tamen rice. Ege nin interesas, ĉu tiu ĉi ago de komprenemo evokos la saman intereson pri lia verketo kiel okazis ĉe lia Abunde kaj redunde. La publikaĵon oni povas mendi en sekretariejo de ĈEA.

Jiří Karen

Receptaro de senviandaj mangoj

En la serio de receptaroj la Esperanto-klubo LA PROGRESO PKO České Budějovice aperigis en la jaro 1989 pluan kajeron, kiu havas titolon "Receptaro de senviandaj mangoj". La 24-paĝan kajeron verkis D-ro ing. L. Fritsch, M. Tomečková, ing. Kalný kaj R. Vlková. Ĝi enhavas 52 receptojn de plej diversaj fruktoj kaj legumaj mangoj, por kiuj oni bezonas brasikrapon, celerion, cepon, ajlon, cinan brasikon, fazeolgusojn, pizon, sabelikon, aneton, krenon, florasikon, kapsikon, karoton, kukumon, tomaton, rafaneton, urtikon, leontodon, rumekson, kreson, tropeolon, laktukon, spinacon, brasikon, fungojn kaj fruktojn, precipe pomojn. Tiaj senviandaj mangoj estas precipe gravaj en la nuna tempo, kiam ĉiu el ni klopodas mangi sanige kaj sengrase. La receptojn kompletigas ĉarmaj desegnoj de Mirka Tomečková, kiu ne estas nekonata ankau al la legantoj de Starto. La broŝuro kompletigas la Esperantan fakan literaturon kaj al la legantoj ĝi alportos multajn sciojn, gojojn kaj ĝuojn. La E-klubo LA PROGRESO meritas nian admiron kaj dankon.

J. Patera

Korespondajn kursojn de Esperanto ĉe D-ro Jaromír Jermář pasintjare sukcese finis:

JUDr. Růžena Mikešová, Ůžice
Ing. Pavel Novák, Český Krumlov
Miloslava Hadenová, Dobšice, Znojmo
Ing. Miroslav Novotný, Vimperk
MUDr. Jan Novotný, Náchod.

Ĉiuj jam fariĝis membroj de ĈEA kaj plejparto el ili daŭrigas en kursoj por progresantoj. Ni deziras al ili multajn sukcesojn kaj gojojn en la Esperanto-movado!

Lingva temo

En Starto n-ro 6/88, p. 8 estis tre bona kaj necesa artikolo: Kunmetitaj verboformoj en Esperanto.

Nur la lasta alineo /p.10/ estas diskutenda. La diskuto /kaj ankaŭ disputo/ pri -ata, -ita daŭras jam jardekojn; ĝi kusas en la problemo, kiun la aŭtoro mem citas komence:.... ĉiu viva lingvo havas siajn specifaĵojn, ĉe kies aplikado en normala konversacio oni devas forlasi la pensmanieron enradikigintan per uzado de la gepatra lingvo, kaj sekve oni devas alproprigi la esprim sistemon de la koncerna lingvo. Ankaŭ Esperanto havas tiajn regulojn, kiujn respektante, oni devas forlasi la al kutimigitan manieron de laŭvorta traduko el la denaska lingvo....

Vere tion ni devas fari. Kaj tio kaŭzis ankaŭ la diskutadon pri tempismo kaj aspektismo. Tiun sferon mi ne volas tuŝi, ĉar tio povus elvoki denovan diskuton. Tre detale pritraktas tion prof. Richard Schulz en sia verko: Pledo por unueca lingvo. Mi volus nur atentigi pri eraroj, kiuj ligigas kun substantivigitaj participoj:

La parolanto estas homo kiu parolas, la parolinto, kiu parolis, la parolonto, kiu parolos. Ekzemplo: La partoprenantoj de la kunveno ofte aplaŭdas. La partoprenantoj de la hieraŭa kunveno ofte aplaŭdis. La partoprenantoj de la morgaŭa kunveno certe ofte aplaŭdos. Kiel kontrolilon oni povas uzi la modifitan frazon: Partoprenante la kunvenon oni /hodiaŭ/ aplaŭdas, /hieraŭ/ aplaŭdis, /morgaŭ/ aplaŭdos. Povas ekzisti ankaŭ: Se kelkaj membroj de la loka klubo venas hejmen el la Universala Kongreso kaj informas la lokajn esperantistojn, oni povas diri: Reveninte el la UK, ili informis la lokajn membrojn. Tio signifas, ke ili unue revenis kaj poste informis. Alia formo: La partoprenintoj de la UK informis la lokajn esperantistojn. Tute erare estas ekz.: La partoprenintoj de la kunveno pridiskutis.... Tio signifas, ke ili diskutis nur post la partopreno de la kunveno, sed ne dum la kunveno. Ĝuste estus: La partoprenantoj pridiskutis.... Simile oni povas trovi formojn: Oni diskutas pri la temo.... La temo estas pridiskutata. - Hieraŭ oni diskutis.... la temo estis pridiskutata hieraŭ. Morgaŭ oni diskutos pri la temo.... La temo estos morgaŭ pridiskutata. Se ni diras: La temo estis pridiskutita, estus klare, ke oni diskutis pri io, kion oni jam antaŭe pridiskutis/oni jam estis diskutintaj/. Simile en la estonteco: La temo estos pridiskutita - signifas, ke la temo estos prezentata iam preta, post diskuto.

Denove ni povas - kontrole - uzi la formon aktivan: Ni estas nun diskutantaj, hieraŭ ni estis diskutantaj, morgaŭ ni estos diskutantaj pri la temo.

Tio estas kelkaj ekzemploj, kiel ni klopodu korekti kelkajn erarojn, devenantajn el la pensmaniero de la gepatra lingvo.

-il-

Ni legis



La sesan internacian konferencon de 1' Kolektivo esperantista komunista (KEK) okazinta en Ruse, Bulgario, de la 24-a ĝis la 27-a de aŭgusto 1989, partoprenis pli ol 250 delegitoj kaj gastoj, venintaj ĉefe el Bulgario kaj Sovetunio, sed ankaŭ el kapitalismaj landoj. Estis elektita nova estraro: k-do L. Grozdanov demisiis kiel prezidanto de KEK pro malsano kaj estis elektita k-do Haim B. Levy, ĵurnalistoj, Sofio, nova prezidanto.

Laŭ Franz Schick

Fin-fine en Sovetunio aperis kondiĉoj por naskigo de soveta E-Video-Muzika Centro. Ĝi komencis funkcii kunigante pli ol cent profesiulojn el 11 sovetiaj respublikoj. Oni anoncas, ke baldaŭ aperos la unua originala granda disko en Esperanto, kiu estas rezulto de komuna laboro de komponisto, poeto, reĝisoro Vladimir Soroka, lia plej populara en Sovetunio E-ensemblo, koncertanta ekde 1981, kaj esperantistoj el diversaj landoj (Hungario, Usono, Bulgario, Japanio, Hispanio, Ĉinio, Francio, GDR, Britio) kaj sovetiaj respublikoj (Ukrainio, Kazahio, Moldavio, Latvio, Armenio, Rusio). La disko konsistas el du partoj. La unua parto "Kiulingve?" en stilo de pop-romantismo rakontas pri amo kaj amikeco de gejunuloj, iliaj vojaĝoj, distroj. La dua parto estas filozofia-psikologia mini-opero "Destin" aŭ "Tragedio de Homo". Aperos ankaŭ la unua muzika video-filmo pri la 2-a Internacia Junulara E-Renkonto en u. Minsk (USSR, 1989), prezentanta diversajn stilojn de soveta originala E-muziko (reĝisoro V. Soroka).

De la jaro 1988 ĝis junio de 1989 Ĉinio eldonis 14 specojn de libroj, kiuj koniĝas Esperanton, Zamenhof, UEA kaj famajn ĉinajn esperantistojn. Inter tiuj libroj estas "Granda Han-lingva Vortaro", "Konciza Britia Enciklopedio" (ĉinlingva), "Porinstruista Enciklopedieto", "Vortaro pri Sociaj Sciencistoj", "Sovetia Enciklopedieto" (ĉinlingva), "Vortaro pri Poemoj", "Konciza Vortaro pri Sociaj Sciencoj", "La Plej-oj", "Jarlibro de Mondaj Aferoj, 1987", "Lingva Enkonduko".

En la unua duonjaro de 1989, la Ĉina E-Eldonejo aperigis 8 novajn librojn: "5000 Jaroj de Ĉinio", "Aventuro de Ĉasisteto dum Ekspediciado", "Antikvaj Filozofoj de Ĉinio", "Kamelo Ŝjangzi", "Granda Pandoj - Brilaj Steloj", "Bestoj kaj Iliaj Patrinoj", "Malgranda Rano Flugis kaj Falis" kaj "Faktoj kaj Fantazioj" verkita de Marjorie Boulton, brita fama verkistino.

La Tibeta Poŝtmarka Kompanio uzis poŝtstampilon de Lhasa pejzago en la lingvoj han-a, tibeta kaj Esperanta. Ĝi, projektita de veterana esperantisto Zhang Linrui (Ĝang Linjui), estas la dua poŝtstampilo en Esperanto sur la Monda Tegmento. (El Popola Ĉinio 8/1989)

Esperanta instrua filmo "Espero", kune farita de la Qingdao-a Asocio de Kultura Intersaĝo kun Aliaj Landoj, Qingdao-a E-Asocio kaj Qingdao-a Televidstacio, gajnis aprile de 1989 la unuan premion en la 1-a aljug-kunveno pri la ĉinaj televidaj instruajloj. Ĝi estis prezentata en la koncerna kunveno novembro de 1989 en Japanio.

La Ĉina Amikeca Eldona Kompanio eldonis februare de 1989 la memoran libron "Memore al Hujucz" verkita de Fei Xiaotong, Xia Yan k.a. En ĝi 5 artikoloj de veteranaj esperantistoj fidele montris liajn elstarajn kontribuojn al la E-movado.

La Tonghua-a Instruista Instituto de Jilin-provinco prenis Esperanton kiel nedevigan studobjekton. Pli ol 300 studentoj lernos en malsamaj kursoj unu jaron po 2 h. ĉiusemajne. La kursojn gvidas s-ro Yu Dequan kaj brita s-ro Richard Howard.

La Poradolta Instituto sub la Pekina Scienca-Teknika Universitato funkciligis duonjaran korespondan E-kurson. Ĝi ekfunkciis la 1-an de julio.

La Hefei-a Fremdlingva Lernejo de Anhui-provinco funkciligis la korespondan E-kurson, kiu varbis lernantojn tutjare. Ĝiaj diplomitoj estas elementnivelaĵoj en nia lingvo.

La kurso pri Esperanta fonetiko estas funkciiĝinta de la Kantona Televidstacio de marto 1989. Ĝar ĝi multe interesas la aŭskultantojn, oni refoje elsendas ĝin de la 3-a de majo. La elsendo daŭros du jarojn, 4-foje ĉiusemajne po 20 minutoj. La Guangdong-a Popola Radiostacio nun funkciiĝas elementan E-kurson.

La Pormaba Korespondan E-kurso kune funkciiĝata de la Chongqing-a Junulara E-lernejo kaj la Jumpionira Ĵurnalo de Sishuan-provinco interesas geknabojn kaj iliajn gepatrojn. Por helpi sian infanon en la lernado, ankaŭ multaj gepatroj lernis en la kurso. - La Linhai-a Geknaba Palaco de Zhejiang-provinco organizis porinfanan E-kurson, en kiu lernis 25 infanoj.

La 1-an de majo 1989 en Haikou, la ĉefurbo de Hainan-provinco, la Hainan-a E-Asocio okazigis sian unuan laborkunvenon, kiun ĉeestis 18 esperantistoj el la tuta provinco. En la kunveno oni diskutis pri la laborplano en 1989. Nun 27 ĉinaj provincoj, autonomaj regionoj kaj municipoj jam havas sian E-Asocieton.

(El Popola Ĉinio 9/1989)

En la 23a Konferenco de la Internacia Ligo de E-istaj Instruistoj en Caerleon oni lanĉis projekton de kompilado de nova vortaro de Esperanto. La elektita nomo por la vortaro estas Interreta Vortaro de Ordinara Esperanto kaj la lancinto estas S-ro Lawrence Mee (Iorens' mi). La Estraro de ILEI decidis subteni la kompiladon kaj doni al ĝi la aŭspicion de ILEI.

La celo de la projekto estas kompli kaj eldoni unulingvan vortaron de la ses mil aŭ iom da ĉiutagaj vortoj bezonataj de esperantistoj en ĉiuj mondpartoj. La lancinto proponas al la mondo konsultlibron pri la ordinara vortoj de nia lingvo, aparte aranĝitan por esti alloga por tiuj nove alvenintoj, kiuj bezonas facile alireblan helpilon. Por ĉiu kapvorto estas donita klarigo aŭ/kaj difino, kun klara indiko pri la vortkategorio per alfikso de la taŭga finaĵo. Por la plejmulto el la kapvortoj estas donita uzekezo, aparte en la kazoj de figura aŭ metafora uzado. Por tiuj pluraj kazoj de dukategorieco de vorto, ambau formoj estas aparte trak-

titaj. Laŭokaze, indiko estas donita de parenca vorto aŭ parencaj vortoj.

La bazo de la tuto estas la Baza Radikaro Oficiala de la Akademio de Esperanto, plus la ceteraj Oficialaj vortoj de nia lingvo, sed plus laŭeble multaj ĉiutagaj vortoj el ĉiuj kontinentoj.

Helpemaj gesamideanoj kaj financaj subtenantoj petu pliajn sciigojn ĉe S-ro Lawrence Mee, Istlia Eldonejo Esperantista, 17 Cranbury Road, Eastleigh, Hants., SO5 5HB Britio.

Ekde kvin jaroj Por-Esperanta Mormonaro faras prezentojn pri la Eklezio de Jesuo Kristo de la Sanktuloj de la Lastaj Tagoj. Dum la 74-a UK en Braĵono okazis faka kunveno, kiun ĉeestis 40 personoj el 15 landoj. Bona spirito regis dum la tuta kunveno, kiu estis fermita per preĝo.

Dum la 25-a Brazilia Kongreso de Esperanto estis elektita nova estrato de Brazilia Esperanto-Ligo: prezidanto Deputito José Lins Albuquerque viceprezidanto Prof. Josias Ferreira Barboza, 1-a sekretario D-ro Enivaldo Alves Silva, 2-a sekretario Prof-ino Maria Ester Pinto de Souza, 3-a sekretario s-ro Carlos Alberto de Deus, 1-a kasisito s-ino Francisca de Fátima Almeida de Deus, 2-a kasisito D-ro Waldir Antonio Silvestre.

La Kongreso akceptis "Rezultoj", en kiuj oni proponas, ke la e-istoj plejeble uzu priekologiajn temojn en siaj publikaĵoj, ke oni, se eble laŭsisteme, uzu priekologiajn temojn en lernolibroj, ke oni instigu al la uzado de tekstoj pri medioprotektado en lernolibroj por la instruado de fremdaj lingvoj kaj por aliaj lernobjektoj, ke la e-istoj kunlaboru kun la organizaĵoj pri medioprotektado por la disvastigo de iliaj ideoj, ke la E-organizaĵoj invitu priekologiajn prelegantojn al siaj ejoj kaj invitu siajn anojn al pormedioprotekta agado, ke la e-istoj klopodu enkonduki E-on en la priekologiajn mediojn por faciligi al iliaj batalantoj la diskonigon de sia agado internaciskale.

Inter la 24-a kaj 27-a de majo 1990 la Kultura Esperanto-Festivalo okazos en

la mezgranda kaj malnova urbo Västerås (vestero:s). Västerås situas ĉirkaŭ 100 kilometroj nord-okcidente de Stokholmo. La bonega ejo en kiu oni trafestos la festivalon estas malnova, sed fresa, ekde bierfarejo. Teatro, literaturo/poezio, muziko/kanto, prelegoj ktp. havos sian lokon dum KEF 3! Oni invitis al la festivalo sovetajn artistojn, inter alie La Leningradan Teatran Grupon, okazos ankaŭ rokmuziko, kulturaj diskutoj kaj prelegoj, trubaduroj ktp. el multaj aliaj diversaj landoj. La adreso de la festivalo estas: Kultura Esperanto-Festivalo 3, Brunnsgatan 21, S-111 38, Svedio.

Kiel plibonigi niajn bibliotekojn?

Ne ĉiam ni scias ĝuste taksi la signifon de la libro en nia Esperanta kulturo (Internacilingva kulturo). Ĝian valoron scias kompreni nia karmemora s-ano Sustr. En la malfacilaj tempoj li fakte savis la bibliotekon de Praga klubo antaŭ nenigo. Nun ĝi kuras duonforĝita en nia plenstopita ejeto, kiun la ĵurnalistino de ĉeĥa gazeto Vlasta trafe nomis butiketo. Ĝi vere meritis pli decan sorton. Ni komparu ĉi tiun tristan realaĵon kun la klopodoj altigi la nivelon de la bibliotekaj servoj en nia najbara lando.

Germana Esperanto-Instituto preparas katalogon de titoloj de libroj kaj de periodaĵoj. La ĵus pretigita nombro de titoloj jam atingis 8 mil. Kunlabore kun bibliotekoj de la tuta mondo ĝi interŝange largigas sian enhavon. Tamen ne ĉio estas havebla interŝange kun ili. Tre ofte nura hazardo malkovras iun rajon. S-ano Pachter informis min, ke li ekzamenis la ĝismunan listigon de esperantaĵoj en germanaj publikaj bibliotekoj pere de komputila prunteprenreto tutgermana kaj li ricevis magran rezulton: 200 titoloj. Tiamaniere la logataro de FRG ricevas la imagon, ke en Esperanto ekzistas nur 200 titoloj. La katalogo preparata de GEI sangos la situacion. S-ano Pachter laboras entuziasme por tiu ĉi celo kaj li ofte vizitas najbarajn landojn kaj klopodas ligi kontaktojn. Li akceptas malnovajn esperantaĵojn interŝange aŭ laŭ interkonsento. E-rondeto en Příbram sendis tiucele ekzemple Bohemajn Grenatojn de Schulhof,

Vortaron Esperantan-ĉeĥan de Čánský, Geologion Internacian ktp. La sistema laboro de Germana Esperanto-Asocio sukcesis kunlaborigi la ceterajn germanajn bibliotekojn kaj nun ĝi ĵus pretigas eldonon de katalogo de la biblioteko de GEI, kiu servos al ĉiuj uzantoj. Ekzemplo de la listigo: B M S Si Geologio internacia, vol 2... ktp.... La mallongigoj signifas, ke la libro troviĝas krom en la biblioteko de GEI en tiuj de Munkeno, Berlino, Stuttgart kaj Sigmaringen. Eldoni katalogojn por la unuopaj bibliotekoj estas tempo-raba kaj multekosta laboro. Jen instigo ankaŭ por niaj iniciatemuloj. Ĉu troviĝos tiaj en Praha, Brno kaj aliloke?

Karel Kraft

Pri ni en la Esperantaj disaŭdigoj.

Radio Polonia raportis 30.9.1989 pri la festotagoj de ĈEA en Havířov en intervjuo kun gvidanto de la pola grupo Muzilo, kiu prezentis sian programon tie. Sekvis raporto pri la konferenco de invalidoj-esperantistoj en Olomouc. - La 24.10.1989 red. A. Pettyn dediĉis la tutan elsendaĵon "Trarigardo de la E-gazetaro" al la 5-a numero de Starto. Lia recenzo de nia gazeto estis tre pozitiva. - La 29.10.1989 raportis pri la 4-a n-ro de Starto la E-programo de Radio Zagreb.

La kalfrazo de la krucvorta enigmo sur la pg. 30 estas:
Ĉi tiun ŝtonon ne levu iu fremdul',
entombe staras ĉi tie Strigospegul'.
ANNO DOMINI M.CCC.L

NI FUNEBRAS

La 20-an de oktobro 1989 mortis subite en aĝo de 45 jaroj s-ano Milada T a k á t s o v á membro de Esperantista klubo en Prago kaj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Kondolencoj al sia familio.

MALLONGE

Pasporta servo

Jam la 16-a eldono de la adresaro Pasporta servo 1989 aperis dum someraj monatoj en Pollando. 904 gastigantoj el 53 landoj de la mondo atendas vian viziton kaj ofertas senpagan gastigadon. La adresaro validas ĝis apero de la eldono 1991 kaj same kiel lastjare ĝi estas acetabla ĉe la landa organizanto, kiu ankaŭ volonte sendos al vi aliĝilon kaj pli detalajn informojn. En nia lando servas ĉirkaŭ 60 gastigantoj. Pli ol triono vivas en la nordmoravia regiono, el Slovakio estas nur 6 gastigantoj. Prezo de la broŝuro estas sama kiel lastjare - 40 Kčs. Skribu aŭ telefonu al Jiří Kreuzberger, 747 56 Dolní Žitovice 157, telefono hejma (653) 93514, laboreja (653) 217062.

Kiu helpas

al sekcio de E-nevidantoj per legado kaj surbendigado de E-libroj? Skribu al: V. Němeček, Mračnická 2, 102 00 Praha 10.

E-montasatantoj

Julie 1990 j. okazos renkontiĝo de E-istoj montasatantoj (3 tagoj en Moskvo, 10 tagoj en Kaukazio proksime de monto Elbrus). En programo estas planitaj diverskategoriaj montaraj piediroj, alpsupranigoj. Planan informon vi ricevos en E-klubo "Edelvejs", ul. 2-Sinickina, 19, SU-111020, Moskvo, Sovetunio, se vi skribos ĝis la 1-a de aprilo 1990. Dezirinde havi ian sperton en montaraj piediroj kaj bone posedi E-on.

ESPERANTO Sekce SČSF

- Svazu československých filatelistů se tímto obrací na všechny esperantisty-filatelisty, kteří mají zájem o esperantskou filatelii, členství v Esperanto sekci SČSF, spolupráci atd., mohou se obrátit přímo na předsedu Esperanto sekce SČSF: s. Vladislav HASALA, p.s. 34, 696 62 STRÁŽNICE, okr. Hodonín, tel. 0631/942507.

Pro své členy vydává ES SČSF zpravodaj "Esperanto", který vychází dvojjazyčně a jsou v něm publikovány odborné články

o esperantské filatelii z pera jak našich, tak i zahraničních autorů.

Esperantské vlašky

Západoslovenský krajský výbor SEZ ponúka upomienkové esperantské vlašky o rozmere 15 x 10 cm. Cena za jednu je 10,- Kčs + poštovné. Záujemci píšete na adresu Mária Tomašovičová, ul.kpt.Uhra 9, 915 01 Nové Mesto nad Váhom.

Komise pro historii a teorii

Ma posledním zasedání ÚV ČES v říjnu 1989 byl schválen organizační řád Komise pro historii a teorii mezinárodního jazyka ČES. Tato komise se bude zabývat historií mezinárodního plánovaného jazyka, zvláště esperanta, na území ČSSR; bude se zabývat obecnou i speciální teorií mezinárodní jazykové komunikace a dějinami, výstavbou a funkcí jednotlivých mezinárodních jazyků (živých i plánovaných). Předmětem jejího zájmu bude také esperantologie, t.j. výzkum zdrojů, struktury, vývoje a komunikativní schopnosti mezinárodního jazyka esperanta. Výsledky své práce bude komise publikovat v čs. i zahraničním odborném tisku.

Zájemci, kteří mohou prakticky či teoreticky práci komise pomoci, nechtě se přihlásit na adresu předsedy: Dr. Jaromír Jermář, CSc., Jablonoň 43, 106 00 Praha 10.


13-a "I T R E E - 9 0"

Honore de la 45-jara datreveno de la liberigo de faŝismo en majo 1945 ESPERANTO-ASOCIO en Kulturligo de GDR - SCHWARZENBERG invitas vin kore al la 13-a ITREE-90.

La renkontiĝo okazos en la 7-a ĝis 11-a de majo 1990 en Antonsthal - logloko Antonshöhe (subdistrikto Schwarzenberg), Fera domo de la paperfabriko Antonsthal.

Partoprenkotizo: 200 markoj. La partoprenkotizo inkluzivas tri tagmanĝojn. Informojn kaj aliĝilojn akceptas: Hannelore Büniger, Fritz-Heckert-Str. 32 DDR-9430 Schwarzenberg.

Ĉiu el partoprenantoj devas kunveturigi bonhumoron kaj bonan veteron. Salutas amike organizantoj!



B. ALOE, D. FIM, J. KAG', 8. KOPAL', 10. PAMIR', 17. ILE, 18. DAO

GRAVA SCIENCA SUKCESO

La 12-an de septembro 1989 en la Lingvosciencia Instituto de L. Štúr de la Slovaka Akademio de Sciencoj sukcese defendis sian disertacion konata slovaka aktivulo - membro de la Centra Komitato de SEA kaj respondeca redaktoro de amika asocia organo Slovaka Esperantisto PhDr. Stanislav Košecký el Bratislava. La temo de la disertacio estis: "Problemoj de internacia komunikado kaj planlingvoj, speciale Esperanto".

En tri ampleksaj kapitoloj la aŭtoro diskutis pri:

- vojoj kaj rimedoj de superado de lingva baro en la sfero de internacia lingvo (i.a. demandoj de komuna lingvo en internaciaj organizaĵoj en la j. 1920-1985, lingva problemaro de UN ktp.),
- planlingvoj (la termino, historio, klasifiko),
- Esperanto (ĝeneralaĵoj, Esp-komunumo, lingva karakterizo).

Scienca gvidanto de la laboro estis konata slovaka lingvisto prof. d-ro J. Horecký, DrSc.

Ni kore gratulas al kara Stano al la atingo de scienca grado "kandidato de sciencoj", kiun li atingis per priesperanta disertacio kiel unua en Ĉeĥoslovakio.

kov

Horizontale:

A. La kvara litero en Esperanta alfabeto - la tria parto de la kasfrazo - marko de litro. B. Siatempe - speciala skribil' enhavanta provizon da inko - tropika vegetaĵo (latine). C. Trinota kanzon' - "50" per romia cifero - konservata mangaĵ'. D. En iu loko - 365 tagoj - "fino" portugale - 3 samtempe ludantaj muzikistoj - kemia signo por oro. E. Numeralo - nulo - objekt' farita por esti imitata - kemia signo por oksigeno - "1101" per romiaj ciferoj. F. Litero de la Esperanta alfabeto - prepozicio de partitiva genitivo - gustigil' por mangaĵo - sufikso signifanta infanan posteulon - nedifina pronomo persona. G. La unua litero de "suo" - la kvara parto de la kasfrazo - kemia signo por fluoro. H. Logant' de Turkujo - hejma muscasanta besto - najlo uzata por kunigi metalajn pecojn - peza metal' (Cu). I. Flava multvalora metalo - komerca valorpape-ro - kemia signo por fosforo - alkohola trinkaĵo - perpiede. J. Kemia signo por niobio - kriado - nederlanda bark' - valiz' - "999" per romiaj ciferoj. K. Kemia signo por oksigeno - greka litero - gibohava best' - laŭ ia maniero - marko de diametro. L. Kemia signo por nitrogeno - la kvina parto de la kasfrazo - kemia signo por uranio. M. Internacia autosigno de Nederlando - autosignoj de Austrujo kaj Hispanujo - adjektivo de "opereto" - "2" per romiaj ciferoj - marko de decilitro. N. Logant' de Egiptujo - ĉiuj prezentadoj de teatro. O. Logant' de Kroatujo - speco de malgranda urso - sangon sucanta besteto.

Vertikale:

1. La unua parto de la kasfrazo. 2. Centro de cirko - lok' kun multaj domoj kaj stratoj - konsonantoj de "logiko". 3. Havi favoron - kemia signo por uranio - adverbo signifanta "pli ol sufiĉe" - kemia signo por tantalio - autosigno de Irano. 4. Maljesoj - korpulentec' - sofo. 5. Marko de tuno - difina artikolo - indiko de atoma energio - brunhara. 6. Ofertaĵo - skiveturi - nulo - kiel (latine). 7. Devizo - logeĵo por bratoj - "jod" renverse. 8. Konsonantoj de "bano" - printempa monato - bonodora rezin'. 9. Sufikso esprimanta malgrandecon - organo de arboj kaj aliaj vegetaĵoj - ĉambra hejt forno. 10. Firma korp' en fiziko - tono - "tegment' de la mondo" - marko de tuno. 11. Konsonantoj de "tipo" - granda sukplena frukt' - sekse karaktero (en gramatiko). 12. Prepozicio de dativo - alkali' - part' de vorto. 13. Laŭta elig' de stomakaj gasoj - fizik' studanta lumajn fenomenojn - geografia kart'. 14. Dio de amo - eterna estaĵo - kemia signo por karbono - internaciaj autosignoj de Hispanujo kaj Francujo. 15. Kemia signo por sulfuro - pluralo de persona pronomo - sufikso esprimanta la agon - ĝenerala nomo de ĉiuj armaĵoj estroj. 16. Kaptado de bestoj - nobela titol' - deklami. 17. Part' de la maldika intesto - marko de metro - lupreni - dufoje "50" per romiaj ciferoj - "unu" france. 18. Literatura verk', destinita por esti dirata antaŭ publiko - prepozicio - araba barko. 19. La dua parto de la kasfrazo - diametro.

Ing. Ĉ. Vidman

ŜAKO

ŜAKO

ŜAKO

ŜAKO

ŜAKO

En la praga Palaco de Kulturo oni aranĝas tradicie en novembro fulmrapidan ŝak-turniron de teamoj. Post malkuraga elpaso de Esperanta teamo en tiu turniro antaŭ du jaroj kaj post la avanco de la Esperanta teamo en 1988 en pli altan klason sekvis en 1989 jam starto de du 8-membra E-teamoj.

La teamo "A" plifortigita de s-anoj Fuka, Kišari kaj ing. Hašler venkis la trian klason kaj postlasis tiajn teamojn, kiel Viktoria Žižkov B, Ministerio de financoj A, Tesla Karlín C, Bohemians C k.a. La E-teamo okupis de la 1-an lokon en la III-a klaso kaj avancis en la II-an klason.

La teamo "B" gvidita de s-ano Fiala okupis en la IV-a klaso la 5-an lokon.

La pragan turniron de teamoj partoprenas pli ol 65 teamoj dividitaj en 5 klasojn. La teamoj estas 10-membra kaj 8-membra. V.Štěpánek

el la estraro de ĈEA

La Federacia Asembleo (parlamento) de ĈSSR nuligis la artikolon 4 de Konstitucio de ĈSSR pri la gvida rolo de Komunista partio en la lando. Sekve de tio la punkto 3 de la 1-a artikolo de Statuto de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kontraŭas la Konstitucion de ĈSSR kaj estas nevalida.

el Kubo

La Ministerio pri Komunikado de la Kuba Respubliko pere de sia poŝta administracio eldonos poŝtmarkon omage al la 75a Universala Kongreso de Esperanto okazonta en Havano de la 14a ĝis la 21a de julio 1990 en la Kongresa Palaco.

Dato de emisio: 7.03.90. Kompletaj serioj: 1.451.120. Valoro: 0,30 peso. Kalandrita papero. Presmaniero: ofseto, kvarkolora. Dentomezuro: 12,5. Mezuro: 31 x 72 mm. Desegnisto: Miguel A. Penate. Tiu ĉi poŝtmarko estos longforma kun aldonita glumarko entenanta la insignon de la 75a UK. Ilustraĵo: verda neregula stelo, blanka kolombo kiel paca simbolo kaj Babela Turo kiel simbolo de monda multlingveco. Mendoj kaj informoj: Empresa COPREFIL, Apartado 1000, Habana 1, Cuba.



STARTO - presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská str. 10, CS-110 01 PRAGO 1, Ĉeĥoslovakio. Aperas 6-foje jare. Redakta komitato: Karel Franc, Jiří Hanousek (grafika arango), Ing. Vlastimil Kočvara, Miroslav Malovec, Jiří Patera (respondeca redaktoro) kaj Helena Štruncová. Presas Podnik služeb města Liberce. Transdonita al preseo 1990-01-10. Jarabono 36 CSK, por eksterlando 48 CSK aŭ 14 NLG, inkluzive de sendkosto. Abonantoj turnu sin al niaj perantoj, al UEA aŭ rekte al nia asocio.

STARTO - nepravidelný věstník Českého esperantského svazu, Jilská 10, 110 01 PRAHA 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Redakční rada: Karel Franc, Jiří Hanousek (grafická úprava), Ing. Vlastimil Kočvara, Miroslav Malovec, Jiří Patera (odpovědný redaktor) a Helena Štruncová. Povoleno odborem kultury NVP č. 310008385 ze dne 18. 3. 1985. Tiskne Podnik služeb města Liberce. Předáno do tisku 10. 1. 1990. Dohledací pošta Praha 07. Snižovaný poplatek za poštovné povolen Ředitelstvem pošt Praha pod č.j. P/1-1267 ze dne 6. 4. 1979.

En la gazeto Nová doba 35/89 sur la dua paĝo troviĝis ĉi tiu alvoko en la ĉeĥa lingvo:

SOCIETO KONKORDO SERĈAS AMIKOJN

En la lastaj jaroj ni komencas paroli malkaŝe/senbare pri la deprima/j/malgaja/j/ situacio/vivkondiĉoj de invalidoj/handikapitoj en nia lando. Nesufiĉaj pensioj, malbona medicina priservado kaj logkondiĉoj, izoliteco - tio ĉio rezultigas la vivon de la invalidoj, kiujn la sorto jam sufiĉe malfavoris, eĉ du - ĝis trifoje pli malfacilan. Ekzistas espero, ke almenaŭ parton de tiuj ĉi problemoj solvos la invalidaj organizoj, fondataj tra la tuta lando.

La materia flanko de la vivo tre gravas, sed ne malpli gravas ankaŭ la flanko spirita. Pri kio okupigu malsana homo, enkrampita inter kvar muroj, al kiu utila okupo/utilaĵo li dediĉu sian liberan tempon, kiel li trovu amikojn? Mi opinias, ke tiu-ĉi-flanke povas helpi nia societo Konkordo. Tial ni pere de Novoje Vremja alparolas ĉiujn invalidojn, ĉar ni deziras faciligi ilian sorton. Ni estas invalidoj-esperantistoj el diversaj partoj de Sovetunio kaj ni fondis korespondan klubon cele studi la internacian lingvon Esperanto. En la jaro 1985 ni estis nur malmultaj, nun ni nombras pli ol du-cent. Siatempe ni formis malgrandan rondeton, nun ni havas statuton de la Tutsoveta Societo de Invalidoj-esperantistoj Konkordo. Esperanto donas al invalidoj tre multajn amikojn kaj interesan, kreivan laboron. Iuj eĉ danke al ilia membreco en la klubo fondis familion. Apud pri Esperanto multaj membroj interesigas pri filozofio, politiko kaj kolektado.

Konkordo okazigas kursojn de Esperanto, dissendas informajn leterojn kun adresoj de novaj amikoj, lingvajn lecionojn, en la leteroj ili glosas aktualajn temojn, aperigas poemojn, humorajojn anoncojn kaj aliajn kontribuojn. Ni anoncas niajn adresojn:

229910 Latvijskaja SSR, VENTSPILS, Rudzutaka 2, kv. 11, Konkordo
aŭ 229910 Latvijskaja SSR, VENTSPILS, Stradyņa 19, kv. 25, Ivanu Prisjažnuku.

Ni alvokas entreprenojn, instituciojn, kulturajn societojn, kooperativojn kaj unuopajn civitanojn helpi nin. Ni esperas, ke troviĝos bonfarantoj, kiuj sendos certan sumon al nia konto.

Ni eldonas nian gazeton kaj tio estas multekosta, ni bezonas subtenon.

Nikolaj Griŝin, prezidanto de Konkordo
Ivan Prisjažnuk, invalido de la 1-a grupo, Ventspils

Český esperantský svaz
110 01 PRAHA 1, Jilská 10

NOVINY

Dohlédací pošta Praha 07
Snížený poštovní poplatek povolen
Ředitelstvím pošt Praha
J. ZN. P/1-1267/79 ze dne 6. 4. 1979